

HUNGARA VIVO

4
1976
8.- Ft

ARANYKANNA FILTER TEO

PACK

TIEL PRAKTIKA!

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: H—1081 Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6.
Poŝta adreso: H—1368 Budapest
Pf.: 193.
Aperas dumonate
XV. jaro 1976. 4-a numero

Numero pri la Esperanta libro

ENHAVO

Benczik, V.: Okdek naŭ jaroj da klopodoj 1

Balkányi, P.: Heroa vivo de Paŭlo Lengyel 3

Varga—Haszonits, Zs.: Per realisma eldonpolitiko — krei kulturon 4

Benczik, V.: Libroprodukto en 1975 5

Fejes, M.: Mi sekvas Esperanto-librojn 6

Fejes, M.: Persistaj presistoj 8

Fajszi, K.: Kiel kaj kial oni fariĝas kolektanto de E-aj libroj 11

Planoj, esperoj de *HEA* (pri la libro-eldonado) 12

Bálint, Sz.: Panoramo

Zolnay—Marosi: Gotika skulptarto (Tr. A. Pechan) 16

Szabó, R. M.: Revuo de revuoj 18

26-a Hungarlanda Esperanto-Kongreso 19

László, F.: Mediŝirmado en Hungario (Tr. A. Pechan) 20

Szenes, I.: Jam penetris en la parlamenton ... 26

Bausani, A.: Historia panoramo de interlingvistiko ... 29

Paĝo de FERI' 30

Németh, J.: Ŝako 31

Gergely, M.: Moto 31

Kalendaro, Humuro 32

Sur la titolpaĝo: La bela kavaliro (Vidu la artikolon de Zolnay)

Okdek naŭ jaroj da klopodoj

Pri la historio de la Esperanta libroeldonado

En 1888 ekzistis 29 esperantlingvaj libroj, en 1891 „jam" 47 — ni legas en niaj manlibroj. Nu, kompreneble okazas eta mistifiko, ja el tiuj 47 libroj, aperintaj ĝis 1891, fakte nur 8 estis verkitaj en Esperanto — la ceteraj 39 estis lerniloj de Esperanto en naciaj lingvoj. Ŝajnas al mi, ke oni devas esti singarda ankaŭ rilate la ciferon de 1989 libroj ĝis la jaro 1912.

Tamen, oni ne estu tro pedanta koncerne la movadan informadon, ja finfine ankaŭ la eldono de lernolibroj — precipe en la praaj tempoj — postulis gravan fortostrecon. Se nur la duonon de la 33 000 registritaj titoloj de la Biblioteko de Brita Esperanto-Asocio konsistigas vere *esperantlingvaj* libroj, kaj se almenaŭ la duono de la ĉi-lastaj estas vere *libroj* (do ne kelkpaĝaj broŝuroj), ni ne devas honti. Eble mi ne troigas asertante, ke la kreita Esperanta libraro estas se ne la plej grava, ĉiukaze la plej temprezista verko de la preskaŭ 90-jara historio de Esperanto, kiu verko donas ĉiam pli fortan memfidon al la novaj generacioj.

Kvankam la komenco estis tute ne facila. Zamenhof devis konstante argumentadi eĉ al la unuaj fervoraj adeptoj de la Internacia Lingvo pri la neceso de la libroeldonado. Multaj ne konsentis pri la bezono de libroj, krom tiu de lerniloj. Nun jam estas klare, ke por lingvo, kies parolantoj ne kunvivas, gazetaro kaj libraro estas nepraj antaŭkondiĉoj de evoluo, eĉ de nura ekzistado.

La heroa periodo de la Esperanta libroeldonado daŭris ĝis 1901. Dum tiuj unuaj dekkvar jaroj aperis iom pli ol cent libroj — plejparte kompreneble broŝuroj —, kiuj senescepte ĉiuj povis aperi nur dank' al gravaj financaj fortostrecoj de kelkaj sindonaj esperantistoj, inter kiuj elstaris Zamenhof mem.

En la jaro 1901, dank' al la klopodoj de *Beaufront*, Zamenhof povis subskribi kontrakton kun la mondfama Pariza eldonejo *Hachette* pri eldono de liaj propraj kaj de li aprobitaj verkoj. Dum longa tempo tiu kontrakto en Esperantio estis akompanata de diversaj supozoj — ne ĉiam bonintencaj —, tamen ni povas diri, ke fakte tiu kontrakto vere fondis la Esperantan libroeldonadon. La eldonejo *Hachette* funkciigis sian Esperanto-fakon ĝis 1918, kaj dum tiu tempo — krom la jarkolektoj de *La Revuo*, entute sur pli ol 6 000 paĝoj — ĝi eldonis ankaŭ kelkdek librojn gravegajn por ni. Tio estis la unua fojo, ke profesia eldonejo kun forta kapitalo okupis sin *en internacia skalo* pri eldonado de Esperantaj libroj.

En 1904 fondiĝis ankaŭ alia eldonejo en Parizo, la *Presa Societo Esperantista*. Ĝi estis pure esperantista entrepreno sub la gvidado de Th. *Cart*, P. *Fruictier* kaj P. *Lengyel*, sekve ĝi ne povis efike konkurenci kun *Hachette*. La ĉefa merito de tiu eldonejo estis ĝia obstina lingva fundamentismo, kio multe kontribuis al tio, ke Esperanto transvivis la Ido-skismon.

La unua mondmilito forblovis ambaŭ eldonejojn. Sed la fundamento de la Esperanta libroeldonado estis metita, jam neforigeble. Kvankam estas tre verŝajne, ke neniu libro de *Hachette* aperis en pli ol mil ekzempleroj — kiu cifero tiutempe fakte ne estis malŝatinda —, oni povas diri, ke la milito sufokis florantan libroeldonadon. La situacio de la tiamaj eldonejoj estis el multaj vidpunktoj pli favora, ol tiu de la nuntempaj. En Eŭropo ne ekzistis transpagaj malfacilaĵoj, kaj la eburĝa socitavolo — la plimulto de la tiama esperantistaro apartenis al ĝi — havis en ĉiuj landoj proksimume la saman vivnivelon. Tiu homogena merkato neniam plu rekreiĝis.

Post la milito ekeldonis Esperantajn verkojn alia fortkapitala profesia eldonejo: *Ferdinand Hirt und Sohn* en Germanio. Ĝi aktivis precipe en la dudekaj jaroj, kaj al ĝi ni ŝuldas interalie la aperon de la *Originala Verkaro* de Zamenhof, kaj gravajn romanojn de *Forge* kaj *Luyken*. Sed iom post iom ankaŭ tiu ĉi eldonejo certe seniluziiĝis, ja iuj titoloj, eldonitaj de ĝi antaŭ kvindek jaroj, ankoraŭ nun troviĝas en la merkato ...

En la jaro 1930 ekfunkciis promesplena eldonejo en Leipzig (Germanio): EKRELO (Eldon-Kooperativo por Revolucia Esperanto-Literaturo).

Dum sia kelkjara ekzisto ĝi eldonis ĉ. 60 librojn: precipe prisocialismajn verkojn, sed ankaŭ beletrajojn kaj la esperantologiajn verkojn de E. *Drezen*. EKRELO verŝajne funkciis per konsiderinda subvencio, kiun probable ĝi ricevis — ĉu rekte, ĉu pere de Sovetrespublika Esperantista Unio, ĉu pere de Komunista Internacio — de la soveta ŝtato. Kelkaj el tiuj libroj dum la lastaj jaroj estis represitaj en Japanio.

En 1931 komencis sian agadon la eldonejo Literatura Mondo en Budapeŝto. Tiu eldonejo baldaŭ ekokupis en la Esperanta eldonagado centran rolon, kiel iam *Hachette*. Dank' al la kompetenta literatura kaj financa gvidado ĝi povis fariĝi *la* eldonejo de la Movado. Dum la plejparto de la eldonejoj ĉu eldonis librojn iom kaprice elektitajn, ĉu servis la interesojn de difinitaj ŝatoj aŭ flankinteresaj grupoj, Literatura Mondo sentis sin respondeca mastro de la Esperanta kulturo. Ĝi kompilis sian eldonplanon koncentrante sian atenton al la evoluinteresoj de la Esperanta kulturo, tamen zorgante ne bankrotiĝi pro troaj ambicioj. Dum la historio de la Esperanto-movado fakte troviĝis nur tri eldonejoj, kiuj — almenaŭ dum certa periodo — volis kaj povis plenumi la rolon de la centra eldonejo de la Movado, servante antaŭ ĉio la evoluigon de la Esperanta kulturo: *Hachette*, *Literatura Mondo* kaj *Stafeto*.



Aparte laŭdinda kaj sukcesa entrepreno de la eldonejo Literatura Mondo estis la fondo de AELA (Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj). En 1933 ĝi havis 960 membrojn. Tiu asocio — bazita sur abonsistemo — certigis por la eldonejo la minimume necesan sekuran merkaton, por la abonantoj favorajn prezojn. Verŝajne tia vojo ankaŭ nuntempe estus irebla.

La nombro de la libroj, eldonitaj de la eldonejo Literatura Mondo ne atingas 100, sed pro la tre konscie farita eldonagado ilia valoro estas grandega. Tiu eldonejo en la lastaj jaroj de sia agado komencis tion, kio povas realiĝi iom post iom nur nuntempe, post la disvastiĝo de la fotopresa tekniko: la revivigon de la inda parto de nia literatura tradicio. Kalocsay stile reviziis la fruan originalan romanon de Vallienne: *Ĉu li?*, sed pro la eksplodo de la milito povis aperi nur la unua volumo.

Tuj post la milito komencis sian agadon la eldonejo *The Esperanto Publishing Company*, kies libroserio, la *Epoko-libroj* ankoraŭ aĉeteblas ĉe UEA: estas malfacile kompreni, kial tiuj plaĉaj kaj malmultekostaj libroj ne elĉerpiĝis dum tridek jaroj.

En 1952 debutis tiu eldonejo, kiu fariĝis inda daŭriganto de la laboro, komencita de Literatura Mondo: *Stafeto*. Ĝia gvidanto kaj posedanto, Juan *Régulo Pérez* posedas ĉiujn ecojn, necesajn por perfekte fari tiun entreprenon: vastan klerecon, profundan konon de la Esperanta kulturo kaj ankaŭ de la Movado, kaj diablo scias, de kie, eĉ administran kapablon.

Tamen, *Stafeto* ne estas la sola grava eldonejo de la postmilitaj tempoj. Gravegan laboron faras lastatempe du nordlandaj eldonejoj: *Fondumo Esperanto*, laŭdindas unuavice pro la eldono de la kvinvoluma *Forge*-serio, kaj *Dansk Esperanto Forlag*, inter kies libroj alternas represoj de malnovaj sukcesaj verkoj kaj kuraĝa eldono de novaj valorajoj. Atentinde konscia kaj konsiderinda eldonagado estas farata jam dum pli ol jardeko en Japanio, kies plej grandioza frukto estas la represo de la kompleta Literatura Mondo. Gratulinda entrepreno estas ankaŭ la eldono de la serio „Iam kompletigota plena verkaro de L. L. Zamenhof", kiun lanĉis la eldonejo *Ludovikito*, kaj ĝis nun jam aperis kvar ampleksaj kaj tre belaspektaj volumoj.



Ricevis novan impulson la eldonagado de la socialismaj landoj. En Eŭropo krom Hungarlando kaj Polio ekaktivis ankaŭ GDR, Ĉeĥoslovakio kaj Sovetio, precipe la Estona Socialisma Respubliko. Estas tre elstara la eldonagado de la Vjetnama Demokratia Respubliko.

Antaŭ okdek naŭ jaroj la apero de esperantlingva broŝureto estis evento. Nun kalkuliĝus evento eble nur la apero de libro lukse ilustrita, —ampleksanta kelkajn centojn da paĝoj. Tamen, por eŭforiaj jubiloj ni ne havas bazon. La plimulto de la broŝuroj, eldonitaj far Zamenhof, presiĝis en mil ekzempleroj, kaj la meza eldonkvanto de la Esperantaj libroj ĝis nun ne superis tiun nombron. Niaj eldonejoj havas antaŭ si pezan taskon. Ili devas ne nur kolekti iom solidan kapitalon, bone pripensi, kiaspecan libron eldoni, por plej efike servi la evoluon de la Esperanta kulturo, sed ili devas doni ankaŭ specialan atenton al la bona organizo de la merkato. Kaj kun ioma inventemo solveblas la plimulto de la nun ekzistantaj problemoj.

Vilmos *Benczik*

Heroo vivo de Paŭlo Lengyel

Kiam post la unua mondmilito mi renkontis lin, li jam estis iom malgaja, sorto-rompita vivlaca viro. Por mi estis tamen granda evento konatiĝi kun li, kiun mi kun junarda koro estimplene rigardis, kiel unu el la plej gravaj pioniroj kaj batalantoj de la „heroa epoko" de nia movado. Lin mem ni konsideris heroo — pri kiu la juna generacio jam apenaŭ scias ion, — ĉar li sinofere dediĉis sin teni la movadon, kiam evidentiĝis, ke la tiutempa ankoraŭ malgranda esperantistaro ne povis ĝin subteni... Tiam la simpla hungara presisto fariĝis ties savanto.

Provu ni koncize revivigi la historion por ni tiel gravan kaj interesan: Paŭlo *de Lengyel* (kiel li laŭ tiutempa kutimo de duonfeŭda Hungario subskribis sin) naskiĝis la 1-an de aprilo 1868 en urbo *Szabadka* (nun *Subotica* en Jugoslavio). Lia patro estis gimnazia profesoro, sed apenaŭ kvarjara li fariĝis orfo. La gimnaziajn studojn li faris en urbo *Pécs,* en 1883 li iĝis presisto kaj en urbeto *Szekszárd* li instalis malgrandan presejon. En 1896 li ricevis ie prospekton pri lernolibro de Esperanto, verkita de Ábel *Barabás* en *Kolozsvár* (nun *Cluj* en Rumanio). Al li ekplaĉis la gramatikaj, vortaraj ekzemploj troveblaj en la prospekto. Lengyel mendis la lernolibron kaj tuj komencis studi ĝin. Laŭ sia posta konfeso li spertis, ke: „Esperanto penetrinte en la cerbon, penetras ankaŭ en la animon, eĉ en la sangon, por transformi nin en efektivan homon..."

Post du tagoj li jam skribis al la sola, tiam ekzistanta Esperanto-revuo: *Lingvo Internacia,* kiu post la ĉeso de la antaŭa gazeto pro la malpermeso en la cara Rusio, tiutempe estis eldonita en Svedio. La redaktoro Paŭlo *Nylén,* akademiano — (la dua Paŭlo en tiu ĉi rakonto!) — amike respondis; Lengyel fariĝis tuj abonanto kaj en tiu gazeto aperis lia unua rakonteto. Li komencis vastan korespondadon kaj tiel li amikiĝis kun Paŭlo *Fruictier* (jam la tria Paŭlo!), fondinto kaj redaktoro de *Internacia Scienca Revuo* kaj de *Medicina Revuo.* En lia kurso lernis prof. *Cart.*

Dume la eldonado de Lingvo Internacia ankaŭ en Svedio devis ĉesi post kvarjara vivo pro financaj kaŭzoj: ne sufiĉaj abonantoj.

Nun kuraĝis nia Lengyel ekagi: li transprenis la eldonon, presadon, kompostadon en Szekszárd, ricevinte la tekstojn de Nylén. La regula apero altiris sufiĉajn abonantojn kaj baldaŭ Nylén eĉ la redaktadon transdonis, la samon proponis ankaŭ Fruictier — tiel Lengyel fariĝis ĉionfarulo. Malagrabla estis tamen la granda distanco por la ĝusta kunlaboro, kvankam la revuo fariĝis centra organo de la esperantistoj. Lengyel rakontis, ke li revis presigi la gazeton en Parizo, en 1904 do li migris — venkinte ĉiujn tre grandajn malfacilaĵojn — kun sia familio kaj kun sia sola presisto-helpanto Kajetano *Sepert* — al Parizo. Tie granda helpo estis por li Fruictier kaj la fama akademiano Th. Cart.

Lengyel tiel karakterizis al ni tiun modestan, sed multe laborantan viron: „Lia nomo estos per oraj literoj sur paĝoj de la historio de Esperanto kaj sen li eĉ ne vivus Esperanto hodiaŭ" — per tio aludante pri tio, kiom energie Cart luktis dum la Ido-krizo por savi Esperanton.

En Parizo, kie li sukcesis fondi propran eldonejo-presejon kaj la esperantistoj el multaj landoj eĉ helpis la fondon de *„Presa Esperantista Societo",* sur kies emblemo *Zamenhof* kaj *Gutenberg* estis unu apud la alia. Krom la gazeto tie aperis multaj gravaj libroj, inter ili „Du noveloj" de *Jókai.* Dum preparo de la presejo numeron de la revuo oni presis en alia loko kun helpo de fervora samideano Paŭlo *Berthelot* (la kvara Paŭlo!). Li inter aliaj fondis la revuon „Esperanto", kiu poste fariĝis la gazeto de UEA! — La Societo konsistis el ses ĉambroj, estis eĉ unu linotip-maŝino, motoro ktp. Tiam mirindaĵo en nia movado!

En Parizo Lengyel pasigis dek feliĉajn, laborplenajn jarojn. Dume li konatiĝis kun hungara tipografo Viktoro *Polgár* kaj tiu aĉetis la presejon. Poste la redaktoro fariĝis prof. Cart. La societo kaj la revuo ekzistis ĝis la mondmilito 1914. Dume de Lengyel aperis diversaj libroj, tradukoj, — plej ampleksa estis la pli frue aperinta *„Libro de l' Humoraĵoj",* 208 paĝa, (1900, dua eldono 1908). Li pretigis la unuan hungaran ŝlosilon, (el kiu en 1909 mi komencis lerni Esperanton) kaj la hungaran tradukon de la Fundamento, kiun mi komreneble akiris kaj ĝis nun konservis. Li redaktis dum 1010—1914 ankaŭ la revueton *„Juna Esperantisto".* Post fondo de la *Akademio de Esperanto* li tariĝis ties membro.

Dum la milito oni lin kun la familio internigis, ĉion forprenante de ili. Tamen li dank' al Esperanto ricevis pli da helpo, ol ĝenerale la hungaroj, ĉar multaj esperantistoj, inter ili mem *Cart,* helpis lin, simile kelkaj el la soldatoj, kiuj parolis Esperanton. En 1919 li povis hejmenveni jam sortobatita, sed baldaŭ ni povis lin ekinteresigi por kunlaboro en la redaktado de *Literatura Mondo,* kie en 1922 aperis lia nomo, apud la nomoj de *Baghy, Kalocsay, Schwartz kaj* la *mia* (kiu eĉ la nomon de la revuo proponis). En la revuo aperis liaj rememoroj, (rakontoj). Tamen poste li retiriĝis kaj en la dua periodo de L. M. li jam ne povis kunlabori.

Ankoraŭ en 1921, kiam je mia instigo eldonejo *„Kultura",* eldonis malgrandan lernolibron de Esperanto, — li verkis la gramatikan parton kaj Kalocsay la frazaron.

Lia nomo estis inter la honoraj membroj de la U. K. en 1929 en Budapeŝto (sed mi ne memoras, ĉu li partoprenis.)

Jam malriĉe, splene li mortis la 3-an de oktobro 1932. Lia filo — ankaŭ esperantisto kaj ankaŭ *Paŭlo* (do jam la kvina Paŭlo) fariĝis teknika aranĝanto de Literatura Mondo...

Kun omaĝo al la memoro de Paŭlo Lengyel rakontis tion la sesa Paŭlo (Balkányi).

Per realisma eldonpolitiko — krei kulturon

Ni, esperantistoj, estas bonŝanca popolo, ĉar nia libroeldonado preskaŭ samaĝas kun la lingvo. Kvankam post intensaj fortostreĉoj, jam Zamenhof mem havis konvenan forumon por aperigi siajn ĉef- kaj bazverkojn; en la unua periodo laboris *Hachette,* ofertante valorajn servojn al la plenaĝinta E-popolo. Tiun rolon poste transprenis Literatura Mondo, altigante nian libro- kaj belliteratur-kulturon ĝis neatenditaj niveloj. Post la dua mondmilito ĝian malpleniĝintan lokon okupis la eldonejo Stafeto, ĉiam pli modernigante la libroeldonajn konceptojn.

Tri ĉefajn karaktertrajtojn ni observas ĉe la ĝisnuna (eĉ nuntempa) eldonado. Unue: tiaspecaj entreprenoj estis — kaj ŝajnas, ke restas — *individuaj,* ili ne kapablas tute memstariĝi ene de la opaj landoj. Nature, oni povus denombri ĉi tie multajn seriozajn kaŭzojn de tiu fenomeno, tamen ne pridiskuteblas, ke tia situacio ne utilas la futuran evoluon de nia eldonpolitiko. Ĉar, kaj tio estas la dua punkto, la klarvido de opaj personoj — kiom ajn kulturitaj ili estas — ne povas brakumi ĉiujn faktorojn bezonatajn por prilabori sanan, racian eldonpolitikon. Kaj trie: la opaj eldonistoj povas movigi nek ekonomie, nek administre tiun aparaton, kiu priesplorus la merkatan situacion, la bezonojn de la legantoj, do, tiel ne eblas krei fruktodonan kontakton kun la legantaro, krome, tute ne antaŭvideblas la moviĝo de la kultura mondo, la atendeblaj direktoj de la verkista agado.

Tiu situacio, kiel dirite, validas eĉ nuntempe. Kvankam prosperas kelkaj relative bonaj eldonejoj (Stafeto, Fondumo, Dansk Esperanto Forlag, japanaj entreprenoj, ktp.), ne eblas diri, ke ili havas iun solidan eldonpolitikan bazon, iun profilon, karakteron bone difineblan. La legantaro plu estas ne orientata, sed eĉ misorientata, ĝi fariĝis tute pasiva faktoro (tiu konstato pli reliefiĝas, se ni prenas kiel kontraŭekzemplon la unuan periodon de Esperanto, ĉefe tiun tempon, kiam Zamenhof fervore agadis). La sana ekvilibro de iu ajn kulturo supozas duflankan rilaton inter donantoj de kulturo — eldonejoj kaj verkistaro — unuflanke, kaj ĝiaj ricevantoj — la legantaro — aliflanke. En E-kulturo tiu ekvilibro mankas; malgraŭ la kolektiveco de esperantistoj, en la kulturo dominas malkolektiveco, individueco, eventualeco.

Por ke nia mondo fariĝu kolektiva kaj komunan lingvon (Esperanton) parolanta, ni devas celadi, ke la E-kulturo ankaŭ kolektiviĝu, estu ĝi ĉies proprajo, per ĉiu akirebla trezoro.

Sed kiel atingi tiun komunan, pli demokratian kulturon? Jen kelkaj pensoj:

1. Oni devus iamaniere fondi grandan, centran libroeldonejon, kiu estu samtempe centro de E-kulturo. La iniciatoro de tiu kulturcentro povus esti ekzemple UEA, aŭ iu jam nun potenca, solida eldonejo. Ni devas substreki la vorton *centra,* ĉar nur tiel ni povus venki la malfacilajojn de la individuaj entreprenoj. Tiu kulturcentro povus pli efike labori, fari bazajn esplorojn pri kulturaj demandoj, krei bonan kontakton inter eldonejo kaj legantaro. Alia solvo estus, se tion komune fondus la socialismaj landoj.

2. Estas tre grave konstati, ke kulturo kaj librokulturo tute ne egalas beletristikon. Cetere, oni ne sufiĉe pripensas, ke la kulturo de internacia lingvo devas esti *kvalite* alispeca ol la naciaj kulturoj. Kial ni imitas la anglojn aŭ la francojn? Se ili havis sian humanisman kulturperiodon, aŭ tiun de klasika poezio, ni fierumas, ke ankaŭ Esperanto havas la sian! Kvazaŭ ni, esperantistoj, estus malplikvalita popolo, kiu devas ĉiam, daŭre rajtigi sin antaŭ la naciaj kulturoj, ĉiam klopodi atingi ilian nivelon! Neniel. Ni jam ne havas tempon por imiti la opajn ŝtupojn de evoluo de naciaj kulturoj; nian kvalite diferencan celon ni atingos nur pere de kvalite diferencaj rimedoj. Pri tio ni devus esti fieraj, se ni ofertus al la homaro, en Esperanto, la bazan kulturon, la plej modernan, la plej utiligeblan, kiu inkluzivas la literaturon, sed ne egalas ĝin. Ni bezonas E-e studeblan sciencon, kaj por tio fakverkojn, fakvortarojn, faklingvajn tavolojn: ni devas ja klopodi, ke nia lingvo finfine anstataŭu la anglan en la scienco.

Tiubaze devus labori la centra eldonejo, kaj agadi *per* la lingvo, ne nur *por* ĝi. Ni tro multe meditadas pri specialaj problemoj, trograndigas, absolutigas ilin. Pere de konkero de sciencaj kampoj ni povus pruvi, ke Esperanto estas ne nur bona, uzebla, belsona lingvo — la belsonecon, krome, oni false manipulas, kvazaŭ ĝi estus scienca kategorio —, sed ĝi estas *utila.* En nia epoko la utileco estas grava faktoro; sed ni ankoraŭ ne pruvis, unusence kaj nepridiskuteble, la utilecon de Esperanto! Kiaj rezultoj de la moderna scienco atingeblas Esperante? Malmultaj, sensignifaj. Tio eĉ ne estas mirinda, ĉar Esperanto ankoraŭ ne estas matura, emancipita lingvo. Kial? Ĉar mankas multaj tavoloj ekzistantaj en la „kulturlingvoj": mankas, ekzemple, fonetikaj normoj. Se iu kompetenta persono en la decidrajtaj mondinstancoj demandus: „Do, bone, vi proponas tiun lingvon por ĝenerala uzo, ni akceptas ĝin, sed diru, kiamaniere oni prononcas ĝin?" — la demandito ne provus diri fiksajn normojn. Lingvo sen firma fonetika bazo ne kapablas por rolo de internacia lingvo, parolata far la trimil-lingva homaro.

Laŭ ni Akademio de Esperanto devus priatenti ankaŭ tiujn problemojn. Ĝi ja estas la organizajo, kies tasko estas okupiĝi pri tio, krom aliaj sciencaj demandoj. La „Aktojn" de la Akademio nur malmultaj povas akiri por sciiĝi pri la gravaj decidoj, konsiloj; la Esperanta gazetaro nur sporade kaj mallonge sciiĝas pri oficialigo de vortoj, pri solvo de gramatikaj, stilaj problemoj rekomenditaj far la Akademio. Ĉar ĝi estas la supera lingva instanco, ni ĝojus, se ĝi povus pli videble, pli publike labori, — tiel ĝi povus pli efike direkti, influi la esperantistaron en ĝusta uzo de la lingvo kaj en la sinperfektigo.

Pro manko de sistema, strečita laborado surkampe de modernaj bezonoj, ni devos en la proksima futuro adiaŭi Esperanton per doloran-

ta koro, kaj preni la anglan (eble alilingvan) lernolibron pro urĝa bezono. Ĉar la tiamaj mondaj forumoj, kiuj fine decidos — ĉar devos decidi! — pri elektata mondolingvo, komparante la Esperante kaj la alilingve (plej verŝajne angle) atingeblajn gravajn bazinformaĵojn, estos en tia situacio, kvazaŭ devus elekti inter du loĝdomoj: unuetaĝa, malkomforta, konsistanta el unusola ejo, — kaj centetaĝa, komforta, multeja ĉielskrapanto.

Nature, ekzistas ankaŭ multaj pozitivaj fenomenoj en la konstruo de nia kulturo, sed nia tasko ne estas laŭdi nin mem, sed serĉi la solvendojn, plifortikigi la pozitivaĵojn. Nia kulturo celas esti ja ne nur tiu de esperantistoj, sed ĉies kulturo, tuthoma kulturo: lingvo portas kulturon, internacia lingvo internacian kulturon. Ni havas antaŭ ni grandegan taskon; ĉiuj esperantistoj, kiuj malŝparas siajn fortojn, energion por malgravaĵoj, anstataŭ konscience, sisteme konstrui nian ĉielskrapanton, rapidigas la morton de nia lingvo kaj kulturo.

Tiu domo devas stari preta fine de nia vojo, rezulte de pli realisma, akordita, utila laboro. Ĉar niaj klopodoj, la historio de E-movado, laŭ leĝoj de la socievoluo, iam finiĝos. Esperanto-movado estas ja historia kategorio, ĝiaj amasiĝintaj rezultoj provokos kvalitan ŝanĝon.

Post dekunu jaroj Esperanto festos sian 100-jaran naskiĝtagon. Por la unuaj adeptoj de la Zamenhofa lingvo ni jam estas futuro, ili sonĝadis eble pri nia epoko, kiam realiĝos la celoj. Jes, ili estis idealismaj, sed ni jam ne rajtas esti tiaj, nin pli urĝas la tempo. Laŭ kalkuloj, ĉirkaŭ la jaro 2000 la homaro alvenos al la punkto, kiam — malgraŭ ies-ties volo — la fina decido pri mondolingvo estos objektive bezonata; kaj la homaro decidos. Kie ni staros tiam? Ĉu antaŭe, ĉu malantaŭe? Ni konstruu ĝis tiam modernan kulturon, estu ni multaj, kulturitaj, realismaj; nia lingvo fariĝu „kulturlingvo", en la vera senco de la vorto, ĝi estu objektive bezonata, utila; se niaj manoj plenplenos de valoraj libroj kaj dokumentoj — tiam ne estos nia kulpo, se ni ne venkos.

Zsuzsa *Varga—Haszonits*

Libroprodukto en 1975

Sur la paĝo 47. de *Esperanto en Perspektivo* oni trovas koncizan statistikon pri la libroprodukto inter 1961 kaj 1969, tio estas dum naŭ jaroj. Laŭ ĝi en la menciita periodo aperis entute 416 esperantlingvaj libroj, sur entute 38 518 paĝoj. (El ili 109 libroj estis originale verkitaj en Esperanto.) Do, dum unu jaro aperis meze *46 libroj.* Triono de la tuto estis beletraĵoj. Post simpla aritmetika operacio evidentiĝas, ke la meza amplekso de la Esperantaj libroj en tiu periodo estis *92 paĝoj.*

Tiu ĉi statistiko donis al mi la impulson ekzameni iomete la produkton de la jaro 1975. Natura fonto por tia ekzameno estas la rubriko: *Laste aperis* ... en la revuo Esperanto. Sed tuj ĉe la komenco mi devis alfronti problemon, ŝajne nesolveblan. Nome, tiu rubriko ofte notis eĉ jarfine de 1975 titolojn kun eldonjaro *1974,* foje-foje ankaŭ kun *1973.* Same, la ĉijaraj numeroj ĝis nun notas plejparte librojn kun eldonjaro 1975. Fine mi decidis preni kompromison, kaj bazis mian ekzamenadon sur la libroj kiuj estis anoncitaj dum la jaro 1975 en la menciita rubriko de la revuo Esperanto, ja fakte la vasta esperantista publiko informiĝas pri la apero de iu libro nur pere de tiu rubriko.

Laŭ tiu ĉi kriterio dum la jaro 1975 aperis 90 libroj, sur entute 8928 paĝoj. Tio signifas, ke la meza amplekso estas 99 paĝoj, kio montras progreson kompare al la statistiko de la periodo 1961—1969. Tamen, el la supraj libroj nur 31 ampleksis pli ol 100 paĝojn, kio en nacilingvaj medioj estas konsiderata minimumo por nomi iun presaĵon libro. Estas interese aldoni, ke esperantisto, kiu aĉetis ĉiun aperintan libron dum la jaro, devis elspezi entute 555,— guldenojn; tio signifas ke la meza prezo de meze 99-paĝa libro estis iom pli ol 6,— guldenoj. (Tamen, tiun ciferon malaltige influas la tradicie moderaj prezoj de la eldonaĵoj de socialismaj landoj. La okcidentlandaj eldonaĵoj foje-foje atingas kapturnige altajn prezojn: la eldonajoj de la Someraj Universitataj Kursoj — 50—100 paĝaj broŝuroj — kostas inter 10—20 guldenoj!)

Analizante la konsiston de tiuj 90 libroj, la rezulto estas iom malgajiga. Unue, el tiu cifero ni devas depreni 15 librojn de entute 1617 paĝoj: ili estas lerniloj de Esperanto por naciaj lingvoj. Aperis vere nur 75 esperantlingvaj libroj, entute sur 7311 paĝoj.

El tiuj 75 nur 23, t. e. proksimume la triono estas beletrajoj, kiuj — almenaŭ teorie — povas kalkuli pri pli granda merkato. La suma paĝonombro de la beletraj verkoj estas 2072. El tiuj 23 beletrajoj nur 9 verkoj estis originale verkitaj (paĝonombro: 946). Kaj eĉ el tiuj 9 verkoj 3 estas represoj, do dum la jaro aperis entute *6 nove kaj originale verkitaj libr(et)oj beletraj.* Ne tro esperiga nombro. Tamen, el tiuj ses verkoj almenaŭ unu estas vera juvelo — cetere kun tre malinda teknika aspekto —: la poemaro *Merlo sur Menhiro* de Albert Goodheir. La prozaĵoj *Neologisme* de Lorjak kaj *El la vivo de Bervala sentaŭgulo* de Beaucaire estas amuzaj legaĵoj, sed ne literaturo: tamen mi deziras al ili baldaŭan disvendiĝon, ĉar tute certe ambaŭ libroj alportos horojn de distro por la legantoj kaj eble ioman kuraĝigan profiton por la eldonintoj.

La nombro de la ne-fikciaj verkoj — mi bone konscias pri la malprecizeco de tiu ĉi nocio — estas 52, sur entute 5339 paĝoj. (Tiu cifero inkluzivas la 847-paĝan verkon *Esperanto en Perspektivo.)*

Komparante la nunan statistikon kun tiu de la jaroj 1961—1969, la progreso estas okulfrapa. Tamen, mia ĝojo galiĝas pensante pri tio, ke en Hungario aperas ĉiujare meze 5000 libroj. 5000 kompare 75. Kaj la eldonkvanto de esperantlingva libro estas meze 1000 ekzempleroj. 75 oble 1000 sumas 75 000.

Antaŭ kelka tempo reaperis en hungara lingvo la „porelita", enigme malfacila, 800-paĝa romano de James *Joyce: Ulysses* — en 40 000 ekzempleroj ...

V. *Benczik*

Mi sekvas Esperanto-librojn

„Ĉu vi parolas ankaŭ Esperante? — demandas la ĉefo la novan fremdlingvan korespondiston, fanfaronantan pri sia lingvoscio.
— Jes, ja mi vivis tie dek jarojn! — respondas li memfide."

La anekdoto estas delonge konata, eĉ ne la plej sprita; tamen la neinformiteco de la fanfaronanta oficisto ankaŭ nun ekridigas nin: ja Esperanto-Landon vane ni serĉus sur mondmapo. Sed se iu legante la supran titolon atendus simile humurajon — do legu plu.

Statistiko de Brita Esperanto Asocio, publikigita antaŭ dek jaroj mencias proksimume 30 000 esperantlingvajn librojn. El tiuj ĉ. 6000 estas literaturaj tradukoj, 2000 la originalajoj, kaj la ceteraj: vortaroj, lernolibroj, prospektoj, fremdultrafikaj eldonaĵoj, ktp.

— Ĉu estas realaj, motivitaj tiuj nombroj; kian rolon havas la libro en la vivo de la internacia lingvo? — pri tio ni paroladas kun membro de propaganda-eldona komisiono de HEA.

V. estas junulo, antaŭ du jaroj li finis la universitaton en la fako de rusa kaj Esperanta lingvoj, tiel li ne nur pro sia socia funkcio sed ankaŭ pro instruiteco bone konas la temon.

— Esperanto atingis amason da interesiĝantoj pere de libroj, lernolibroj, sed la libroj kontribuis ne nur al ĝia disvastiĝo, sed ankaŭ al ĝia rezervo, la libroj gardis por la vivo Esperanton kaj savis ĝin en periodoj, kiam oni volis eĉ sufoki la esperanto-vortojn.

Ni ne havas detalajn indikojn pri la legateco de libroj en lingvo Esperanto, sed ili estas konstante pruntitaj el la bibliotekoj. Por tiu celo ankaŭ ni disdonis nian bibliotekon konsistintan el plurmil libroj inter grandaj publikaj bibliotekoj, por ke pli vasta publiko atingu tiujn.

En la najbara domo, en Kultura kaj Informa Servo de HEA — de multaj konata nur kiel: libroservo — Onklo D., veterana esperantisto, aliĝinta al laborista Esperanto-movado antaŭ kvindek jaroj — ĝuste volas jam fermi la kontoron.

— Ne vi estas la sola, kiu venas por informoj, konsiloj — ĝuste tiucele ni ja estas ĉi tie — li diras. Krom informoj kaj konsiloj ni donas ankaŭ konkretan helpon kaj por komencantoj kaj por progresantoj. Nia Libroservo helpas kontentigi legbezonojn de esperantistoj. Ni akiras por ili eksterlandajn eldonajojn kaj laŭ mendoj ni liveras provincen, aŭ niajn enlandajn eldonajojn ankaŭ eksterlanden.

— *Kion vi rekomendus por hungaraj esperantistoj?*

— Por pliperfektigi la lingvoscion: lernolibron de W. Auld, kaj Plena Vortaro-n; por legajo ĉiu povas elekti laŭ sia interesiĝo kaj gusto.

Sur la bretoj ni vidas verkojn de *Vazov, Čapek, Kivi* kaj *Tagore:* Internacia literaturo — en interlingvo.

— *Kaj kion por eksterlandanoj?*

— La Fotoalbumon: Hungario sur bildoj, eldonajojn de *Corvina:* „La tragedio"...-n kaj poemaron de *Petőfi,* kaj la revuon Hungara Vivo.

— *Kaj kion vi proponus al mi, se mi volus artikoli pri Esperanto-libroj?*

— Por konkreta helpo katalogon de Hungarlanda Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko de Szeged, kaj bibliografian verkon: „Esperanto en Hungarlando"; por konsilo: objektivecon. Ne entuziasmiĝu, ne primiru kaj mirigu la temon. Esperanto-libroj naskiĝis nek en alambiko[1], nek la cikonio ilin venigis al mondo, nature ja, ke ili ekzistas.

* * *

1. alambiko: distilbalono.

AKUTAGAWA

LA KAPAO

kaj aliaj rakontoj

ONI PAROLAS ESPERANTE — min logas la montrafenestra surskribo en librobrokantejon de Lenin-bulvardo.

— Nu, tion mi ekprovos... sed tuj mi rezignas pri ekzameno, kiam P. min resalutas elinter la librovendistoj. P. ne estas simple librovendisto, kiu parolas Esperante, sed li estas esperantisto, kiu laboras ĝuste en librovendejo, li sukcesis eĉ superan ŝtatan lingvoekzamenon de Esperanto.

— *Kiajn esperantlingvajn eldonaĵojn, raraĵojn vi renkontis ĉi tie, kiu estis la plej valora libro per kiuj vi okupiĝis?*

— Ĉi tie mi aĉetis la unuan hungarlandan Esperanto-lernolibron, tiun de Barabás, eldonitan en 1898. Kvankam mi jam ne bezonis ĝin por lernado, nek kolektanto mi estas, mi taksas la tiaĵojn: mi aĉetis por mi mem. Kaj koncerne ĝian prezon unu PIV estis la plej valora, kies nova ekzemplero kostas 1000 forintojn. Mi transprenis ĝin por la vendejo. Mia ĉefo iom ripročis min: Ĉu iu donos por tiu uzita vortaro kvincent forintojn? Ni metis ĝin en la fenestron: ankoraŭ samtage ĝin ni forvendis.

— *Kiuj vendas tiajn librojn?*

— Plejparte neesperantistoj, kiuj pro nekopreno eĉ taksi ilin ne povas inde. Kaj ili faras bone, se portos al ni, ĉar per nia perado la libro tamen atingas la interesiĝantojn kaj tiel plenumas sian destinon.

En tiu vendejo la Esperanto-libro estas en bonaj manoj.

* * *

En la katalogejo de la Ĉefurba Biblioteko *„Szabó Ervin"* mi foliumas la slipetojn. Tri librojn mi petas: „La verda koro"-n de Baghy, „La faraono"-n de Prus, kaj la „Kazohinio"-n.

En la sama vicordo mi trovas 4—2—2 nomojn de pruntintoj antaŭ mi ĉi-jare.

Tiuj nombroj parolas al mi multe: vivas kaj efikas la Esperanto-libroj, mi kompilas por mi mem la finan frazon de mia riportaĵo, kiam konato min alparolas.

— Nu, ĉu vi do ankaŭ legas? Mi pensis, ke vi nur verkas! salutas min mokeme R. Por tion fari lin rajtigas nia amikeco, ligita antaŭ-longe en Esperanto-klubo.

Mi kvietigas lin, ke ankaŭ nun mi nur artikoli volas: pri Esperanto-libroj. — Ne forgesu la privatajn kolektaĵojn — li atentigas min. Ni priparolas, ke baldaŭ mi vizitos lin kaj lian bibliotekon.

* * *

En la malgranda ĉambro de R. estas tri librošrankoj. En tiuj: lernolibroj, leksikonoj — kaj vasta aro de Esperantaj libroj.

RAYMOND SCHWARTZ

LA STRANGA BUTIKO

— *Kion signifas por vi Esperanto?* mi demandas.

— Internaciismon, movadan laboron, fenestron al la mondo, vojaĝojn, amikojn... multon.

— *Kaj la esperantlingvaj libroj?*

Komence elspezon, ĉar ili ja ne estas malmultekostaj... Ĝuste pro tio mi ne permesas al mi nur posedi ilin kaj gardi en la librošranko, sed mi finlegas ĉiujn miajn akiritaĵojn, — kaj tio jam donas al mi enspezon, profiton spiritan.

— Pro miaj jus finitaj studoj daŭrantaj dekunu jarojn, lingvojn lerni mi ja ne povis, ke mi legu mondliteraturon en originalo, sed en Esperanta traduko mi jam post unu jaro legis Kalevala kaj historian romanon de Vazov: Sub la jugo... La tradukoj malfermis al mi pordon al mondliteraturo, kaj mi ĝuas kaj rigardas parton de la tutmonda homa kulturo — ekkonitan pere de Esperanto — ia ĝenerala komuna trezoro.

* * * * *

Esperantlingva libro do *ekzistas*. Oni ĝin verkas, tradukas, redaktas, eldonas, aĉetas, vendas, kolektas, pruntas, legas. Kie? — De Budapeŝto gis Kanariaj Insuloj, de Alasko ĝis Fajrolando — kie konjektiĝas limoj de la nevidebla Esperanto-Lando.

(Laŭ sia hungarlingva artikolo, aperinta en Eszperantó Magazin 1974/2 tradukis kaj iom mallongigis: M. Fejes)

PERSISTAJ PRESISTOJ

„Floros la Biblioteko, floros ĉio, falos la Biblioteko, falos ĉio".

(Zamenhof)

La nomojn kaj meritojn de kunlaborintoj de nia literaturo gardas la literaturhistorio, tamen ĝis nun ni apenaŭ aŭdis-legis pri aktivuloj de la teknika flanko de eldon-agado: pri kompostistoj, tipografoj, ktp., pri sennomaj, diligentaj laboristoj de la presista metio, sen kies laboro la eldonaĵoj meniam estus naskiĝintaj.

Vere: kiu(j) estis presisto(j) ekzemple de Budapeŝta Skolo? — Honte mi foliumas tiutempajn eldonaĵojn.

La nocio „Budapeŝta Skolo" ligiĝas strikte al Literatura Mondo, — nu eble, la gepatroj estis budapeŝtanoj kaj ilia infano enmatrikuliĝis en Budapeŝto, —, sed mia unua rimarko estas, ke la akuŝejo estis en la proksima urbo *Vác,* kaj la akuŝisto estis: Gyula *Bénik,* ĉar la surskribon: *Pestvidéki Nyomda, Vác, Üzemvezető Bénik Gyula* (Presejo Peŝt-departementa, uzinestro Gyula *Bénik*) mi trovas en la revuo ekde la dua periodo, kaj ankoraŭ en trideko da libroj.

Sed LM eldonis ja ĉ. 80 librojn! Ĉu ĉiujn faris Gyula Bénik en Vác? Ekscite mi foliumas plu, serĉante nur la subliniajn indikojn pri presejo.

Sur alia librobreto staras verkoj de Baghy. Inter tiuj en bibliofila eldono de „Verda Koro" mi renkontas alian nomon: Presejo de Aleksandro *Szalay.* Simile en „Verdaj Donkihotoj", en du eldonoj de „Vagabondo kantas", kaj en „Sur sanga tero" Szalay estis ankaŭ eldonisto de la du laste menciitaj libroj.

La lasta eldonaĵo en kiu mi renkontas nomon de Bénik, aŭ presejon de Vác: estas „Gvidlibro I." de Pechan, eldonjaro: 1964; do ekde reapero de LM forpasis pli ol tri jardekoj, duono de homa vivo! Ĉu Gyula Bénik oferis sin plene al Esperanto-eldonaĵoj? Kaj la nomon Szalay mi trovas ankoraŭ en kelkaj postmilitaj, poresperantaj propagandiloj hungarlingvaj. Sed kion nun ili faras? Ĉu ili vivas ankoraŭ?

Pri ili mi demandas nian artan redaktoron, konanton de presista metio.

— Jes, feliĉe, ambaŭ ili vivas, ambaŭ ili estas jam pensiuloj. Bénik vivas en Vác, kaj en la tiea presejo eĉ nun li laboras por ni, flegante nian revuon „Eszperantó Magazin", kaj Szalay vivas en Budapeŝto en strato *Aurora.* Li apartenas al Esperanto Grupo *Egressy.*

Duoble mi hontas. Se mi, kunlaboranto de Magazin ne scias, ke nia preseja helpanto identas kun la presisto de LM; kaj se mi, vizitanto de Egressy-Klubo ne konas A. Szalay — kiel do la legantoj ilin konu? Nia ŝuldo estas prezenti ilin.

Ĉe presisto de Literatura Mondo

La nomo de Gyula Bénik estas konata ankaŭ en HEA. Antaŭ grava kunsido mi petas pri li mallongan informon de la sekretario.

— Ĉu s-ano Bénik? Presisto de Literatura Mondo, de Hungara Esperantisto kaj Hungara Fervojista Mondo; sekretario de Esperanto-Klubo „Danubkurbiĝo en Vác, por lia poresperanta laboro ĉimonate li estis distingita per memormedalo de Landa Packonsilantaro — jen la telegrame kurta, sed sufiĉa por mi respondo.

Post rapida leterŝanĝo mi vojaĝas al la proksima urbeto Vác. En la stacidomo atendas min viro de mezalta staturo, okulvitra, jam grizharara, sed junece vigla. Precipe tia, se temas pri sia urbo, aŭ pri Esperanto, li konigas la vidindaĵojn al mi tiel detale, kaj kun tiom da amo, ke mi ne povas eviti la demandon:

— *Ĉu Vi ankaŭ ĉi tie naskiĝis?*

— Ne, mi naskiĝis en Budapeŝto. Mi transloĝiĝis ĉi-tien nur en la dudekaj jaroj, kaj post la fino de mezlernejo ankaŭ ĉi tie mi lernis la fakon, kaj

J. Bénik ĉe kompostmašino



poste min dungis presejhavanto kaj gazeteldonisto s-ro *Dercsényi.*

— *Do Vi partoprenis en la presado de LM ekde la dua periodo, ĉu ne?*

— Jes, en 1931 refondis la revuon Vilmos *Bleier,* kaj li konis mian ĉefon, tiel venis LM al nia presejo. Kaj ĉar la ĉefo ne estis presisto, min li komisiis kiel uzinestron.

— *Kaj kiu estis pli frue: Gyula Bénik la presisto, aŭ la esperantisto?*

— Esperanton mi komencis studi jam kiel lernanto, sed per aŭtodidakta metodo mi ne tro sukcesis. Sed kiam ni ricevis por laboro presi revuon Esperantlingvan, mi denove ekinteresiĝis pri ĝi, ke mi ne laboru sen kompreno, aŭtomate. Tiutempe ni ekvigligis Esperanton en nia urbo: gvidis kurson por ni Ferenc *Szilágyi,* kaj en la postaj jaroj jam mi estis kursgvidanto, mi aliĝis ankaŭ al movado, estis membro de HESL, ni fondis ankaŭ grupon en Vác.

La konversacion ni jam daŭrigas en lia hejmo, en modesta familia domo, starante kaj sidante apud libroŝranko. Riĉan kolektajon li havas el la LM-eldonajoj, sed ne kompletan. Jen, ironio de sorto: kiam li presis la revuon kaj la librojn, tiutempe ne restis tempo por ankaŭ finlegi ilin kaj nun, kiam li havus tempon —, kaj li preferas la originalan Esperanto-literaturon — jam mankas al li pluraj numeroj, respektive libroj.

— *Ĉu Vi aŭdis, ke en Japanio oni reeldonis ĉiujn numerojn de LM? — mi demandas lin.*

— Jes, mi legis ie pri tio sed mi ankoraŭ ne vidis tiujn.

Subskribinto vidis, kaj ne volas lin malĝojigi per la sciigo de la prezo de la represita kolektajo: en libroservo de HEA por tri mil forintoj estas aĉetebla — prezo tro alta por pensiulo. — Eble iu en Japanio havas superfluan duplikaton, por surprizi per ĝi la mastron de la originalajo?

Gyula Bénik gardas ankaŭ anekdotojn, okazintajn en la presejo. La presprovajon la presejo sendis perpoŝte al Budapeŝto, sed ĉe la enpaĝigo ĉiam ĉeestis unu el la redaktoroj: plurfoje *Kalocsay,* fojefoje *Baghy* aŭ *Bodó.*

Post bonhumura anekdoto pri Kalocsay li rakontas ankaŭ malgajan, sed vere okazintan historion pri Baghy: li alvenis por enpaĝigo, sed jam ne havis monon por revojaĝo, tiel li devis peti prunte... — sed tion vi ne skribru, li atentigas min.

Tamen, mi sentas, ke publikigo de tiu afero ne ofendas memoron de la verkisto, sed bone karakterizas la iamajn cirkonstancojn: Esperantio eĉ en la epoko de florado ne povis subteni sian poeton...

— *Kaj ĉu por Vi estis profita afero okupiĝi pri Esperantaj eldonajoj, aŭ ĝenerale pri Esperanto?*

— En la presejo mi estis ja simpla dungito, neniam financan pluson al mi donis tiu laboro, eĉ, okazis, ke mia ĉefo povis entrepreni la mendon, nur se mi plenumos ĝin krom la normala labortempo. Eĉ se la eldonisto, Vilmos Bleier promesis apartan premion, mi ne povis tion enkalkuli ja mi sciis, ke ankaŭ li vivas de tago al tago.

Koncerne mian eksterpresejan poresperantan agadon, multaj konatoj jam demandis min pri la gajno de tiu aktiveco...

Neesperantistoj ne povas kompreni, ke ĉion mi faris altruisme pro mia interna konvinkiĝo pri la bezono kaj beno de internacia lingvo, kies fanatikulo mi estas. Mi esperas, ke tiu mia — kaj nia — laboro ne estas vana, iam ni sukcesos...

Romaneca vivo de eldonisto de romanoj

Tri originalaj romanoj de *Baghy,* lernolibro de Baghy kaj *Baranyai,* 96-paĝa propreverkita koresponda kurso, hungarlingvaj poresperantaj propagandiloj, kaj pluraj aliaj eldonajoj (inter ili plurmil propagandaj flugfolioj) gardas la nomon de presisto kaj eldonisto: Aleksandro (Sándor) *Szalay.*

La unua presiĝis en la tridekaj jaroj, la lasta en 1945. Lia nomo estas nepre menciinda, se temas pri oferemaj simpluloj de batalo por Esperanto.

Ankaŭ lin mi trovas provinco, apud Balatono, en vilaĝeto *Csopak,* kie li vivas ekde printempo ĝis aŭtuno ĉiujare, jam de pluraj jaroj solece, ermite.

— *Ĉi-jare vi plenumos vian okdekan jaron, kaj ekde 1932 aperis via nomo sub esperantlingvaj presaĵoj. Eble tiam Vi esperantiĝis?* — demandas mi la blankharan veteranon.

Kaj en la zorgeme flegata ĝardeno, sub juglandarbo, inter floroj li komencas rakonti sian vivon, kiu estus inda ne nur por temo de artikoleto, sed havas tiom da travivaĵoj kaj okazintaĵoj, ke prefere la temo sin proponus al romanverkistoj...

— Antaŭ du semajnoj mi festis mian okdekan naskigtaĝon, — li diras. Kaj koncerne la daton de mia esperantistiĝo, do tio ne kongruas kun la dato de miaj unuaj Esperantaj presaĵoj.

En la jaro 1910 en sia naskiĝurbo Kaposvár la juna meti-lernanto legas artikolon pri internacia lingvo Esperanto, li priaŭskultas prelegon far de tiama propagandisto: *Marich,* kaj aŭdas pri fondiĝo de loka Esperanto-klubo, al kiu apartenis precipe la urba inteligentularo, oficiroj, oficistoj, ktp. Li ne aliĝas al ili, tamen ekde la unua momento li sentas sin esperantisto.

Apenaŭ la meti-lernanto finas siajn fakajn studojn, kaj komencus sian studvojaĝon por perfektigi sin ĉe diversaj presistaj majstroj — eksplodas la unua mondmilito. Kaj estas ankaŭ lia vico: post la soldata, artileria baza instruado li trovas sin en Italiaj batalkampoj. Malfeliĉe — aŭ feliĉe lin trafas akcidento ekster batalo, li grave vundiĝas, preskaŭ blindiĝas, sed tiu akcidento savas lin de sensenca plua batalo por fremdaj celoj. Sed post sia resaniĝo el hospitalo li sin anoncas en la Ruĝan Armeon, ja nun temas pri defendo de la patrio. La ruĝa artileriano partoprenas en pluraj bataloj, kaj post la falo de la Hungara Konsilia Respubliko, en sia naskiĝurbo kun aliaj organizas so-

A. Szalay ĉe la enirejo de sia presejo

cialdemokratian partion kaj sindikaton de presistoj, dumtempe li laboras kiel uzinestro en presejo.

Li estas sekretario de Laborista Kulturhejmo, kaj kiam iu soldatoficiro sin anoncas por gvidi Esperanto-kurson por laboristoj — li kun ĝojo apogas lin, kaj ankaŭ li mem partoprenas la kurson. (Kiel interesajo: la oficiro estis d-ro József *Takács*, tiam soldata kuracisto, poste redaktoro, movada gvidanto, aŭtoro de vortaroj — kaj dum la dua mondmilito: viktimo de faŝismo.) Estis 1921. Samjare samideano Szalay komencas korespondi en internacia lingvo, liaj poemtradukaĵoj aperas en „Verda stelo" de Teo *Jung*, kaj li komencas organizi laŭ Budapeŝta alvoko lokan grupon de HESL, kies sekretario li fariĝos.

Ankoraŭ en 1919 li edziĝas, kaj poste duonjarcenton li vivas en harmonio kun sia edzino.

En 1926 li transloĝiĝas al *Bátaszék*, kaj estas posedanto de papervendejo, ankaŭ tie memoras lin esperantistoj: li gvidis kurson unua en la vilaĝo. La vivo de komercisto ne kontentigas la ageman presiston, post tri jaroj li vendas la komercejon, kaj aĉetas modestan presejeton en *Kiskőrös*, naskiĝurbo de *Petőfi*. Sed province la laboro mankas, liaj mendantoj estas precipe Budapeŝtaj firmaoj, tial en 1932 li translokigas sian presejon al Budapeŝto, kaj tiutempe li komencas presi Esperantlingvajn verkojn, ĉu laŭ mendo, ĉu en propra eldono, proprariske. Li presas ankaŭ la revuon: Hungara Heroldo, kaj pensas pri hungarlingva pri kaj poresperanta revuo kies realigon tamen malhelpas liaj financoj. (— Forpasis pli ol kvardek jaroj, ĝis kiam tiun ideon realigis HEA, per eldono de Eszperantó Magazin.)

Mi interrompas la rakonton per aktuala demando:

— *Nun jam certe ne estas negoca sekreto: ĉu estis por Vi profitdona laboro eldoni esperantaĵojn?*

— Nu, mi konis neniun, kiu riĉiĝis pere de Esperantaj eldonaĵoj. La risko estis granda, kaj se la eldonisto povis pagi — tiam kompensiĝis la laboro. Sed tute ne estis profitdona entrepreno, kion mi faris: bibliofila eldonajo en cent aŭ ducent ekzempleroj, tion oni faras nur pro amo al la afero.

Kaj li sufiĉe multe riskis: li faris ekzemple la unuan poemaron de hungara socialisma (nun rekonata, laŭerata) poeto: László *Benjámin*.

Sed ekzistas risko ne nur financa, kaj Szalay ĉiam akceptis tiun riskon, se sentis, ke temas pri justa, vera afero. Tiel li presis en 1934 la flugfoliojn „*Vasas*" (Ferlaboristo), kaj pro tio li estis kondamnita, unu jaron li pasigis en malliberejo, La iama laboristo ne forgesis sian devenon, kaj restis fidela al la laboristaro. Jam delonge li estis presejhavanto — do laŭ striktaj doktrinoj: kapitalisto, sed se venis iamaj HESL-anoj, kaj petis helpon de „kamarado" Szalay — li ĉiam helpis, eĉ, se sciis, ke la mendantoj neniam povos pagi.

Post la ĉeso de HESL, funkciis en Hungario nur la burĝa Esperanto-societo (HES), kaj tiu de katolikoj — kaj nia presisto aliĝas al ili.

Venas la dua mondmilito. Ankaŭ Esperanto suferis, kaj vera internaciisto estas antaŭ ĉio patrioto: Szalay partoprenas en kontraŭfaŝisma rezista movado; pro liaj meritoj post la liberiĝo mem la ministro-prezidanto distingigas lin per medalo „Por libero de Hungario". Ĉio ŝajnas esti en ordo. Li vivas kaj laboras en liberiĝinta lando, komenciĝis konstruado de socialismo — do realiĝas liaj revoj. Denove ekfunkcias lia eldonejo: aperas de li propagandiloj de *Baghy* kaj *Tiborc*, li eldonas propran cirkuleron... kiam okazas nekomprenebla afero: denove li estis arestita pro politikaj kaŭzoj. Ĉu li eldonis iun nepermesitan presaĵon, ĉu li aliĝis al opoziciuloj, aŭ li nur fariĝis viktimo de la ĉiam pli akriĝinta klasbatalo tiutempe deklarita? — Jam estas superflue demandi. En 1950 li liberiĝis, kaj devis ĉion komenci denove. La presejojn intertempe transprenis la ŝtato — restis por Szalay nur la laboro.

Pri Esperanto estas silento tiutempe en Hungario, sed kiam la cirkonstancoj permesas, kaj renaskiĝas la movado, ankaŭ A. Szalay troviĝas inter esperantistoj.

Ekde dekkvar jaroj li estas pensiumita, sed pasintjare li ankoraŭ laboris en presejo, parte pro kutimo de la ŝatata laboro, parte por aldoni iom al la pensio negranda. Antaŭ sep jaroj li vidviĝis, ekde tiam ĉiun someron li pasigas ĉi tie en soleco. De tempo al tempo vizitas lin liaj gefiloj, genepoj, eĉ unu pranepinon li havas. La presista metio estas tradicio en lia familio: lia filo *László* estas presejdirektoro en Budapeŝto, kaj Kálmán: ĉefinĝeniero en provinca presejo.

Lia vivo estas plena da okazintaĵoj, travivajoj, eĉ aventuroj; la vivo-vojo estas nek rekta, nek spirala, sed iom zigzaga, sed estu okazinta io ajn, li eĉ nun konfesos sin konvinkiĝinta adepto de socialismo, kaj tiu de Esperanto. Honoron al tiu konvinkiĝo, kaj honoron al la konfesanto!

M. Fejes

Kiel kaj kial oni fariĝas kolektanto de Esperantaj libroj?

Multaj kaj multfoje demandas min pri tio. Kiel leganta homo kaj libro-amanto mi jam tiam havigis kelkajn Esperantajn librojn, kiam ankoraŭ eĉ legi ne scipovis ilin.

La komencantoj ĉiam (iomete tro) entuziasme klopodas disvastigi la lingvon. Ankaŭ mi same. Sed mi estis jam komencanta maljunulo, tial la ilojn kaj metodojn decis elekteme uzi. Pripensinte, ke Esperanto estas ankaŭ kultura movado, mi propagandis per libroj. Mi varbis lernantojn montrinte miajn — ĉiam kunportitajn — librojn. Kiam mia biblioteko bezonis pli grandan lokon ol unu aktujo, mi farigis la unuajn kseroksajn kopiojn pri libro-titolpaĝoj. El ĉi tiu ekĝermiĝis poste la deziro: ekhavi la bildaron de la kompleta Hungaria Esperanto-libraro. La modesta deziro naskis tiun ekspozician materialon, kiu nun jam enhavas preskaŭ senmanke la tutan serion de

1. Esperantigita hungara belliteraturo de 1905 ĝis hodiaŭ.
2. Jam originale en Esperanto kreita verkaro de hungaraj verkistoj, poetoj (kie ajn oni eldonis ilin) de komenco ĝis hodiaŭ.
3. Propagandaj kajeroj, studoj, eksplikoj, informiloj, sciencpopularigaj laboraĵoj de 1898 ĝis hodiaŭ ne nur Esperante, sed ankaŭ en fremdaj lingvoj se la verkistoj estis hungaroj aŭ la libroj aperis en Hungario.
4. Ĉiuj vortaroj kaj lernolibroj de 1898 ĝis hodiaŭ.

La kolektaĵo jam de longe estas migranta ekspozicio. Krom la interesiĝanta esperantistaro, multaj ne esperantistoj rigardis ĝin kaj miris pro ties surpriza riĉeco. Ĉiam tio rezultas pli malpli grandajn grupetojn, kursojn. Tiel la ekspozicio — feliĉa akcesora produktaĵo de mia kolektemo, kolektado — fariĝis spirita propraĵo de la movado kaj servas ekskluzive ties celojn. Por mi mem estas ĝi simple vivanta katalogo de la ekzistantaj libroj.

Mem la kolektado de la libroj multe malpli rapide prosperis ol la fotado de fremdaj libroj. Mi estis tute komencanto, ne havis eksterlandajn amikojn, eĉ pro hontemo kaj modesteco mi ne kuraĝis proksimiĝi al la lokaj granduloj, el kiuj — poste kelkaj fariĝis miaj sinceraj amikoj.

Interesemuloj en la ekspozicio kaj Károly Fajszi

Bibliografioj (tre maloftaj en Esperantio) tute ne estis je mia dispono, eĉ mi tute ne sciis pri ties ekzisto. Ĝis tiam mi aŭdis-lernis nur pri kelkaj nomoj kaj verkoj. Do, de kie informiĝi pri la kolektindaĵoj.

En la flaviĝintaj-paliĝintaj malnovaj periodaĵoj abundis la recenzoj pri libroj. Ĉi tiuj recenzoj donis la unuan vojmontrilon al la mistika mondo de la Esperanto-libro. Mi skribis kartotekon pri ĉiuj titoloj, kies ekzistadon mi de ie eksciis. La kartotekaro timige grandiĝis, sed la bildo ne volis klariĝi. Mia kartotekaro jam signis, kion oni devas kolekti, sed tute ne respondis la demandon: de kie kaj kiamaniere. Mi baldaŭ povis konstati ke — kvankam la kolektado de Esperantaj libroj nenie estas infanludo — inter niaj cirkonstancoj tio havas superhomajn malfacilaĵojn. La prapresaĵojn oni eldonis en minimumaj ekzempleroj, tre ofte en sensignifa eksteraĵo sur malbonkvalita papero. (La ne esperantistaj heredintoj — ĉefe Esperanton ne tro ŝatantaj vidvinoj — simple elĵetis ilin.) Ne forgesu: siajn ŝatatajn verketojn el la propra poŝo eldonigis la antaŭuloj kaj inter ili ne troviĝis multaj riĉuloj. Jen la klarigo de la modesteco.

La internacia lingvo helpis disfluigi ĉi tiujn verketojn al la kvin kontinentoj — tie perdiĝi por eterne, pro la samaj kaŭzoj. Aliflanke la sama modesteco, ekstera sensignifeco kune kun la nekonataj verkistoj, sennomaj eldonistoj tute ne allogis la publikajn bibliotekojn aĉeti ilin — por gardi. Tiel la malnovaĵoj (70—80 jaraj) jam estas senescepte rarajoj.

Ankaŭ la du grandaj militoj helpis per siaj kruelaj iloj maldensigi — kune kun la esperantistoj — ankaŭ la esperantaĵojn.

Kaj nun? Oni sufiĉe multnombre aperigas pli malpli bonajn librojn vaste en la granda mondo. Tiuj, kiuj devenas el socialismaj landoj estas simple aĉeteblaj. Ĉe ni la prezoj — inter ili ankaŭ la prezoj de la libroj — estas pli malaltaj ol en la okcidentaj landoj.

Post la longa plendado oni rajte demandas pri la rezulto. Mia kolektanta stato kompreneble dum la ja-

Planoj, esperoj

Pri la eldonplanoj de Hungara Esperanto-Asocio

Hungario ĉiam okupis aparte signifan, gravan lokon en la Esperanto-movado, kaj speciale en ĝia kulturo. Paŭlo *Lengyel*, Julio *Baghy*, Kálmán *Kalocsay*, Lajos *Totsche/Tárkony*, Imre *Baranyai*, Ferenc *Szilágyi*, Sándor *Szathmári* — jen listo de hungaroj, tamen tiuj nomoj sonas tre intime por la oreloj de ĉiu klera esperantisto en la mondo.

Sed por ke la penso de la verkisto atingu la leganton, necesas periloj: revuoj kaj libroj. La aspekto kaj enhavo de *Hungara Vivo* dum la lastaj jaroj bone montros, ke la Hungara Esperanto Asocio kaj la hungara esperantistaro bone konscias pri la neceso de la kulturado de la Esperanta literaturo. Sed oni konscias ankaŭ, ke libroj eble eĉ pli efike ol revuo povas servi la interesojn de la Esperanta kulturo.

Tiel HEA venis al la konkludo, ke ĝi devas komenci intensan eldonan aktivadon. Rezulte de la klopodoj naskiĝis sufiĉe ambicia plano, kiu — kompreneble — povos realiĝi nur tiam, se montriĝos la necesa interesiĝo flanke de la esperantistaro.

Du maldikaj libretoj — po 32 paĝoj, en la formato 19x14 cm — jam verŝajne estos en la manoj de la legantoj, kiam tiu ĉi artikolo aperos: dekunu belaj poemoj el la siatempe furora poemlibro de Kalocsay, *Streĉita Kordo*, kaj el animskue interesa rakonto de Zsigmond *Móricz*, *Malriĉaj homoj*, tradukita perfekte de Karlo *Bodó*. (La ĉi-lasta estas represo el la iama *Hungara Antologio.)*

Aperos plej malfrue ĝis la 31-a de marto 1977 la Jubilea Antologio de Belartaj Konkursoj. Elektis la materialon el la produkto de la jaroj inter 1951—1975 W. *Auld* kaj V. *Benczik*. La mini-formatan libreton — tamen sen lupeo legeblan — enkondukos la prologo de H. *Tonkin* kaj fermos la postparolo de B. *Ragnar sson*. La antaŭvidebla prezo de la libreto estos lo, — guldenoj.

HEA lanĉas ankaŭ aboneblan serion de kvar libroj, kiuj aperos probable ankaŭ ĝis la 31-a de marto 1977. La suma amplekso de la kvar libroj estos inter 500—550 paĝoj de formato 14x19 cm. Oni povas aboni tiujn librojn por la sumo de 30, — guldenoj, kiu sumo inkluzivas poŝtan liveron al la adreso de la abonintoj. (La suma prezo per unuopa aĉetado estos 35, — gld., plus sendkostoj.) Jen la kvar libroj:

Ferenc Szilágyi: Koko krias jam! (Originala novelaro.)

Kvaropo (Represo de la fama poemlibro de *Auld, Dinwoodie, Francis* kaj *Rossetti*. Tiu libro estis la uverturo de la tria periodo de la Esperanta literaturo.)

Lajos Tárkony: De paĝo al paĝo (Originalaj eseoj, interalie pri *Baghy, Kalocsay, Schwartz, Forge* kaj aliaj verkistoj.)

Julio Baghy: Holanda pupo (Tri originalaj unuaktaĵoj; krom la titoldona verko aperos en ĝi *Dum tondras kanonoj* kaj *Landlima renkonto.)*

Hungara Esperanto- Asocio esperas, ke la publiko donos sian subtenon al tiu ĉi plano. La sukceso aŭ malsukceso de tiu ĉi entrepreno fakte signos la maturecon aŭ la malmaturecon de la esperantista legantaro.

Gvidlibro por supera ekzameno, red. de A. *Pechan* estas inter la plej necesaj verkoj baldaŭ aperigendaj. La eldonon oni planas enhavanta ambaŭ volumojn en unu. Plej gravajn ĉapitrojn verkis *Baghy* (Gramatiko), *Kalocsay* (Literaturhistorio de E), *Szerdahelyi* (Enkonduko en instruadon de E), kaj krome pluraj konataj fakuloj (Historio de int. lingvo kaj movado).

La unua eldono estis aklame, laŭde akceptita kaj uzata ĝis nun en la tuta, mondo, — sed jam de jaroj vane serĉata. Gravan mankon do forigos ĝia nova apero.

---

roj multe pliboniĝis. Bonaj helpiloj estas ĉe mia mano. *Davidov, Stojan,* Enciklopedio, *Courtinat,* Perspektivo, *Haupenthal, Takács* viciĝas kune kun la dekduoj de diversaj jarlibroj kaj almanakoj. Jen la rezulto de pli ol *sesjara* senĉesa laboro. *Laŭnombre mi akiris preskaŭ 1800 titolojn, hungarajn kaj eksterlandajn, mondfamajn kaj forgesitajn pionirojn.*

La hungaraj p r e s k a ŭ senmanke. El la plena verkaro de *Zamenhof, Auld, Boulton, Bulthuis, Forĝe, Lapenna, Privat,* I. H. *Rosbach,* R. *Schwarcz, Warighien* ktp. ktp., nur kelkaj volumoj mankas.

Se estas pli malfacila tasko ol la libro-kolektado, tio estas la savado de perdiĝemaj periodaĵoj. El ili mi gardas 300 kompletajn jarkolektojn kaj pli ol 800 mankhavaj jarkolektoj atendas la kompletigon.

Antaŭ ne longe Budapeŝto estis la koro de la tiama libroeldonado kaj nun troviĝas nek privata kolektaĵo, nek publika biblioteko tia, kian meritus la pasinteco de la hungara movado.

La kolektadon oni devas daŭrigi eĉ se el privata poŝo kaj el privata entuziasmo ĝis la tempo, kiam, Budapeŝta Esperanto Arkivo, provetanta nun siajn unuajn paŝojn pli fortiĝos kaj ne baziĝinte sole sur la oferemo de la malriĉaj donacantoj trovos eblecon krei decan kaj indan fonduson por vera Esperanto-Biblioteko.

Károly *Fajszi*



VOPA-pasto el ok ovoj:

VOSZK

Garantias ok kokinoj

Paston de nivelo alta

Heroldo kun kapujo

La Mondligo de Hungaroj estas en konstanta kontakto kun tri kaj duon milionoj da hungaroj vivantaj dise en la mondo. Laŭ István Molnár vicsekretario de la Mondligo, la sporada hungararo, kies iuj partoj jam ofte ne flue parolas la hungaran lingvon — apartenas al tri grupoj. La unuaj, kiuj elmigris en la komenco de la 20-a jarcento, serĉis ĉefe vivtenon en aliaj landoj, — estas la plej fidelaj al la naskolando. La dua kategorio post la liberiĝo de la lando fuĝis eksterlanden pro politikaj kaŭzoj. Tiuj malfacile proksimiĝas unu al alia pro propra orienteco. Fine en 1956, okaze de la kontraŭrevolucio, multaj aventuremaj gejunuloj forlasis la patrion, sed poste utiligante la amnestion granda parto revenis. Aliaj, kiuj loksidiĝis eksterlande, ofte hejmenvenas, eĉ sendas siajn gefilojn al Hungario por perfektigi la lingvoscion. Unuan fojon en 1970 oni aranĝis patrolingvan konferencon, kiun poste la Mondligo ĉiujare okazigas por 7—14 jaraj infanoj dum la somero ĉe Balatono. Ankaŭ ĉi-jare la geknaboj lernadas krom la somerumado. La gejunuloj 15—18 jaraj perfektigas la patrinlingvon, ekkonas la literaturon kaj historion de Hungario en urbo Sárospatak, kaj en la fama kolegio en la antikva burgo de iama regnestro Rákóczi. La Mondligo de Hungaroj jam de 29 jaroj aperigas dusemajnan gazeton „Magyar Hírek" (Hungaraj Sciigoj) en 85 mil ekzempleroj, kaj sendas ĝin al la kvin kontinentoj. Fine la Mondligo havas propran vojaĝoficejon por helpi tiujn hungardevenajn personojn, kiuj deziras viziti nian landon.

* * *

Antaŭ 200 jaroj naskiĝis la fama hungara poeto Dániel *Berzsenyi* en la vilaĝo *Egyházashetye* en Okcident-Hungaria departemento *Vas*. Ĉi-okaze la Budapeŝta Literatura Muzeo *„Petőfi"* aranĝis ekspozicion, kie inter la manuskriptoj kaj libroj estas videblaj 45 plumdesegnaĵoj pri la vivo kaj temoj de poemoj de Berzsenyi. La grafikaĵojn faris la premiita pentristo Ferenc *Martyn*. En la departemento *Somogy* en urbo *Marcali* la studentoj de gimnazio Berzsenyi aranĝis literaturan konkurson kaj kronis la buston de la poeto per floroj. En urbo *Kaposvár* oni malfermis arkivan ekspozicion. Fine en vilaĝo *Nikla*, en iama loĝloko de Berzsenyi oni inaŭguris konstantan memormuzeon.

panoramo

Jam ekde jardekoj okazas la restarigaj laboroj en la Palaco de burgo Buda. Antaŭ du jaroj oni trovis gotikajn statuojn, kiuj dum 600 jaroj ripozis en la tero. Oni supozas, ke la pli ol 60 gotikaj, parte sendifektaj, pretaj kaj duonpretaj statuoj devenas el la 14-a jarcento kaj tiujn kreis la skulptistoj de reĝo *Ludoviko la Granda*. Poste en la 15-a jarcento la hungara reĝo Sigismondo farigis grandan transformigan konstruadon, kiam la skulptaĵoj kune kun la aliaj kahelaj kaj ceteraj rompaĵoj venis en la rubejon. La rezulto de dujara laboro estas, ke la valoraj statuoj en originala beleco staras en inda loko. En la kadro de konstanta ekspozicio 22 laikaj statuoj estas videblaj en la gotika kavalira ĉambrego, naŭ religiaj statuoj en la gotika kapelo. La duonpretaj statuoj kaj aliaj skulptaĵoj, respektive fragmentoj kaj blazonrestaĵoj estas metitaj en aliaj partoj de la belega palaco de burgo Buda. *(Vidu la studon: „Gotika skulptarto . . .)"*

* * *

La unua Hungarlanda ekspozicio de Nicolas Schäffer malfermiĝis en urbo Eger en la Domo de Tekniko. La hungardevena artisto ekde 1936 vivas en Parizo kaj utiligas la instrumentojn de elektroniko kaj cibernetiko en sia artista laboro. Tiu aktiveco koincidas kun la plej novaj teknika, scienca kaj arta esploradoj de la 20-a jarcento.

Apostola aŭ profeta figuro

panoramo

En Hungario en la departemento *Békés* vivas la plejparto de diversaj nacioj. Ĉiu sepa loĝanto estas slovaka, germana, sudslava aŭ rumana. Ilia situacio estas sama kun tiu de la hungaroj. Ili povas esti gvidantoj en diversaj ŝtataj institutoj. Konstante kreskas la dulingveco; en la departemento Békés funkcias naŭ lernejoj de naciaj instrulingvoj, kie ofte lernas ankaŭ la hungaraj infanoj. Tiamaniere multaj homoj legas kaj parolas en literatura nivelo du eĉ tri lingvojn. Tute ĉesis la iama lingva kverelo. La ludadojn, dancojn, kantojn, morojn de diversaj nacioj gardas kaj propagandas naŭ artaj ensembloj. En urbo *Békéscsaba* estas fama la Folklora Dancensemblo, en urbo *Szarvas* nacia vilaĝmuzeo, kaj ekzistas multaj kulturdomoj. Krom la naciaj infanĝardenoj, elementaj lernejoj, gimnazioj estas en la departemento preskaŭ kvindek naciaj bibliotekoj por varti la diversajn gepatrajn linglingvojn.

* * *

La hungara Ministerio de Klerigado donacis al la finna-ugra katedro de Viena Universitato la lingvistikan fakbibliotekon de la mortinta lingvista profesoro István Papp. La grandvalora scienca kolekto konsistas el mil volumoj, kiujn transdonis en Vieno al la Universitato la hungara vicministro d-ro Károly Garamvölgyi.

Episkopa figuro

Apostola aŭ profeta figuro

Al Germanio (GFR) veturis la dekdu-membra trupo de hungara Ŝtata Pupteatro. En Pupfestivalo okazinta en urbo *Braunschweig* ili ludis ses fojojn la teatrajon *„Johano la Brava"* (fabel-eposo de *Petőfi*), kies adapton faris d-ro Dezső *Szilágyi*. Inter la scenoj estis interpolita germanlingva komentario, kiun majstre diris la publike konata hungara aktoro Iván *Darvas*.

* * *

Laŭ la Hindia gazeto The Statesman la fotojn de hungara artisto Károly Gink inspiras tri kompozicioj de Bartók. La fotoj respegulas la animon de danco kaj muziko. La alia granda gazeto The Times of India skribis, ke tiu veterano de hungara fotoarto atingis la grandajn samtempajn artistojn. Károly Gink tramigris Gruzion, Grekion, Ekstrem-orienton serĉinte memoraĵojn de arthistorio. Tiu interesiĝo logis lin al Hindio — skribis la gazeto. Dum du monatoj li veturadis tra la granda subkontinento per flugmaŝino, ĉaro aŭ piedire, senpaŭze farinte 4800 fotojn. El tiuj li volas verki libron pri arto kaj kulturo de Hindio. Post la hejmenveno Gink diris, ke la fotoekspozicio pri la temoj de Bartók okazis en Budapeŝto en modesta kelologejo. La libroeldonejo Corvina — okaze de la 30-a datreveno de atingo de sendependeco de Hindio — aperigis fotoalbumon, kies teksto redaktis arthistoriistino Vera Horváth.

* * *

En Hindio ĉe la 26-a internacia konkurso de infandesegnoj „Shankar", hungaraj infanoj atingis grandan sukceson. Ili meritis du orajn medalojn „Nehru", dek arĝentajn medalojn; 18 infanoj ricevis memoraĵojn kaj 49 estis laŭditaj per diplomoj. La premiojn alvenintajn el Hindio en la hungara Ministerio de Klerigado vicministro Maria Hanga transdonis al la infanoj. En la solenaĵo ĉeestis Narayanaswarmy Narasimham, ataŝeo de la Budapeŝta Ambasado de Hindia Respubliko, krome la gepatroj kaj instruistoj de la infanoj.

Tr. Szilárd *Bálint*

Gotika skulptarto en l

Viro kun ĉapelo

Dum la restaŭraj laboroj de la historie kaj arte fama iama reĝa palaco, sub la tero de palaca korto en 1974 estis trovita aro de parte rompiĝintaj statuoj kaj statuopecoj. Granda parto de tiu „statu-galerio" konsistas el figuroj de monduma-kortega personaro: kvaliroj, damoj, heroldoj. Ĝis nun estis kolektitaj 60 statu-elementoj aŭ torsoj. La kompletan etaton de niaj statuoj post la identigo de la partoj apartenantaj unu al alia — mi ne taksas malpli ol 48—50 statuoj.

Jam ĉe la unuaj trovitaĵoj — kies materio devenas senescepte el la kalkoŝtono-minejo de *Budafok* (apud Budapeŝto) — evidentiĝis, ke laŭ grandeco la statuoj apartenas cefe al du grupoj La alteco de kavaliroj estas parte 135 cm, tiu de aliaj nur 90 cm, do duono de normala alteco. Okulfrapa estis ankaŭ tio, ke plejparto de la figuroj fiksiĝis en movo, turniĝo de korpo, de kapo: tio estas signo de komponado en reciproka kunapartenado de unuj al aliaj . . .

Kaj jene mi alvenas al punkto, el kiu mi povas harmoniigi niajn statuojn en la Eŭropa akordiĝo. Sinjoro kaj armita heroldo, kavaliro kaj paĝio aperigitaj en komuna sceno troviĝas krom la nun trovita Buda-a statugalerio en tuta Eŭropo sole sur unu loko: en Vieno, sur *Singertor de Stefanskirche* (Kantista pordego de Stefan-katedralo) . . .

Tamen se ni metas unu apud la alian la statuojn Vienajn kaj tiujn de Buda — devenantajn el proksimume sama tempo — evidentiĝas ankaŭ io alia. Nome tio, ke la statuoj el Buda estas mesaĝistoj pri arta medio eĉ pli bela, pli evoluinta kaj pli moderna ol tiu de la pordego en Vieno.

Per tio mi neniel intencas proklami la tempan primarecon de la statuoj en Buda kontraŭ tiuj de Vieno. *Tamen jes la kvalitan superecon!* Ĉar nek samtempaj memorajoj de Vieno, nek tiuj de Prago efikis je Buda; sed ni povas trovi — ĝuste per la helpo de germana arthistoriisto W. *Pinder* — tian prafonton, tian modelon de figurado, arkaikan tipon, kiu povis servi prabildo, modelo por la reĝogalerioj de Buda, Vieno, Prago.

En la post-1920-aj jaroj Wilhelm *Pinder* Berlina profesoro, arthistoriisto alvokis la atenton: la princaj paroj kaj iliaj heroldoj estas unikaj tiaj kolektivaj figuradoj, kiuj sekvas la reĝogaleriojn de franca reĝo Karlo la Kvina, skulptitaj en *Louvre* inter jaroj 1360—70. La reĝostatuoj, akompanataj po unu heroldo, skulptigitaj

Virino kun kaptuko



Profeta kapo



mezepoka burgo Buda

Sankta Bartolomeo, kun kapuĉa libro

de *Karlo Valois,* ĉiuj neniiĝis dum la franca revolucio. Tiel — ĝis la malkovraĵoj en Buda en j. 1974 — restis Vieno unika konservanto de figurada tipo tiaspeca.

Niaj trovaĵoj tiel antaŭmetas pluan eblecon de arkeologia esplorado. Unu, inter multaj aliaj eblecoj de plua esplorado.

Tamen krom la ebleco ili donas en niajn manojn ankaŭ interesan realaĵon, nome tiun, ke nia galerio (nun jam trovebla en la historia muzeo en Budapeŝta burgpalaco) estas unika tiutempa kaj tiuspeca statugalerio en la mondo — apud la Vienaj pordegstatuoj iom malpli kvalitaj.

László Zolnay

* * *

Evidentas, ke pri *ekzisto* de arta kulturo de Hungariaj landaj centroj konvinke ni povas konkludi el ĝia elradiado kaj el respegulado sur artaj kreaĵoj en foraj regionoj, sed tiu *dedukto,* kies precizecon influas multaj faktoroj, ne povas anstataŭi la monumentojn mem. La esploroj ekis ĝuste — pro konkludoj rilatantaj je ekzisto de tiaj centroj, inter ili je la signifo de Buda — antaŭ tridek jaroj, en spuroj de militaj detruoj, kaj tiuj malkovris nombrajn, vere surprizajn kaj epokfarajn monumentojn. Oni rekonis novajn interrilatojn pri la kortegaj artoj de 14—15-a jarcentoj en Hungario, kaj pri iliaj efikoj. Rajte iĝis do sensacio la statu-restaĵaro surterigita neatendite en 1974, kiu donis impete mane palpeblajn karakteron, trajtojn al la kortega arto en Buda, formanta je estetika evento tiun kulturon de la 14—15-a jarcentoj, kiu ĝis nun vivis nur en konkludoj.



Profeta aŭ apostola kapo, en kapuĉo



Tiuj statuoj estis metitaj en la jaroj post 1440 samtempe, sur saman lokon, kie László *Zolnay* kaj liaj kunlaboratoj ilin trovis . . . Konsiderante la peripetiojn de la statuoj en jaroj antaŭ 1440, kaj ankaŭ tion, ke ili staris dum ioma tempo sur siaj lokoj, ni povas diri verŝajna, ke ili estas rigardeblaj kiel memoraĵoj de la skulptista ornamaĵaro el jaroj antaŭ 1400—1410, do el tempo antaŭanta la grandan transformigon de la palaco laŭ planoj de reĝo hungara kej ĉeha, imperiestro germana-roma: *Sigismondo la Granda.*

Tiuj statuoj estas variaj laŭ stilo, kaj ankaŭ laŭ sia destino originala, kapablas doni kvazaŭ transversan sekcon pri la klopodoj de kortega arto en la epoko antaŭ kaj ĉirkaŭ la jaro 1400.

Ernő Marosi

Tr. A. Pechan

Mária Rózsa Szabó:

REVUO DE REVUOJ

Ni tutkore salutas nian parencan organon de titolo POLA ESPERANTISTO, kiu renaskiĝis en 1975. Kiel la ĉefredaktoro Jerzy *Uspienski* heroldas en la gvidartikolo de la 1—2. duobla numero de la dumonata gazeto en 1975: „... Enpaŝante en la novan jaron de la vivo de nia ĉiam prigrumblata sed ja ŝatata kaj proksima Pola Esperantisto ni povas deklari, ke en tiu ĉi jaro ĝi denove iom ŝanĝos la vizaĝkoloron. La redakcio, konsiderante la postulojn de la legantoj de unu flanko kaj la indikojn de la Prezidio de la Ĉefa Estraro de PEA, strebos pli larĝe prezenti la multajn rimedojn kaj metodojn de nia movado, ĝiajn atingojn kaj problemojn en la laboro por la komuna celo". Pli mallonge dirite, la gazeto strebos *esti pli esperantista organo,* ol ĝi estis dum kelkaj lastaj jaroj. Kvankam ĝia lastjara enhavo havis sian motivigon — la 30 jaroj de Popola Pollando — ĝi servis ankaŭ al la komuna celo: „interkompreniĝo inter la popoloj per interkonatiĝo." Estas ĝojige por ni, hungaroj, ke ni povas legi kelkajn vicojn ankaŭ en la enkonduka artikolo de la 1975/1—2. numeroj pri la ne surpapera kunlaboro estanta inter la socialismaj landaj asocioj en Germana Demokratia Respubliko, Pollando kaj Hungario. La redaktosistemo de tiu ĉi revuo alproprigas la supre menciitajn taskojn kaj devojn de la renaskiĝinta movada organo. Krom kelkaj specialaj Esperanto-koncernaĵoj tiu numero de la dumonata gazeto enhavas multajn „ekster-Esperantajn" menciindaĵojn pri la jaro de la venko, kiu finis la duan mondmiliton, — pri la virina jaro, pri la vivo utila de Jerzy *Grum,* pri bazaj metodologiaj problemoj de interlingvistiko surbaze de la mallongigita ĉehoslovaka prelego de d-ro Mahomet J. *Isaev,* pri naskiĝinta nova Portugalio, — la plej speciala artikolo okupiĝas pri la Esperanto-kurso en la Pola Televizio. Por la infanoj kaj junularo la Gdanska televizio, kune kun la Redakcioj de la Pola Televizio en Varsovio kaj Vroclavo prilaboris programon le la nunjaraj vintraj „Teleferioj". La Redakcio de la Gdanska Televizio en la konkursajoj ricevis ĉ. 1500 leterojn el tuta Pollando, el ĉiuj vojevodioj, eĉ lige kun la tiel granda interesiĝo, ankaŭ la Televizio Varsovio. La programo de TV Gdansko vaste reeĥis en la pola gazetaro, kiu aperigis plurajn pozitivajn rimarkojn, recenzojn pri la unua programo koncerne Esperanton, skribas Józef *Golec.* Post ĉio ĉi ni, hungaraj esperantistoj opinias sekvinda ekzemplo por trarompi la „verdan kurtenon" antaŭ la interkomunikiloj.

PILO-PRESS, Internacia Informservo, aperas ĉiusemajne pere de la eldonanto Ludwig *Pickel,* (D—8500 *Nürnberg* 1, Pk. 2113 Jarabono 30 GM.) — Enmaniganta ĝian 1976/9-an numeron, oni konstatas, ke la entute 4-paĝa, A/5-a forma folio kvazaŭ amika letero anoncas sin ĉiusemajne en nia poŝtkesto, informante nin pri diversaj programoj, anoncoj, novaĵoj, pri naciaj someraj universitatoj kaj aliaj aranĝoj, ĉefe pri germanaj programoj, eldonoj. Preskaŭ unu paĝo okupiĝas pri la Eŭropaj radioprogramoj, en tiu numero pri la Svisa, Viena kaj Varsovia dissendoj. La plej freŝaj novaĵoj temas pri Esperantaj, kaj alilingvaj (minoritataj) programoj, ĉiel interesaj legaĵoj. En la homo formiĝas la demando: kiel povas kolekti la eldonanto unusola, mem tiun larĝaspektajn sciindaĵojn? En la alia numero de PILO-PRESS, (1976/12.) oni trovas detalan radioprogramon de la Eŭropa Esperanto-Kongreso inter 16. 4. 76. — 19. 4. 76. Krom tio ni povas legi kelkajn tre kortuŝajn vortojn pri la post-Helsinki-a periodo, dezirante la normaligon, konkordiĝon kaj repaciĝon inter la pola kaj germana popolo. Tiu numero diras lastan adiaŭon de nia epokkreanta, neforgesebla d-ro Kolomano *Kalocsay.*

En la nomo de la literaturamikaro de Hungara Vivo ni salutas la novan ĉehoslovakan literaturan eldonaĵon PANORAMO. Post la unua, duobla numero 1974 — ni povas legi la pli novan literaturan almanakon de Starto, organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, kun titolo Panoramo — Aŭtuno — 1975. Sur ĝiaj 56 paĝoj aperis nunjarcentaj eĉ nuntempaj verkistoj ĉeĥaj kaj slovakaj, Esperantaj originaloj kaj tradukitaj, kune kun interesa studaĵo de la redaktoro Oldrich *Knichal.* Anstataŭ la mankanta enhavtabelo ni represas la noblan liston de la aŭtoroj: *Brezina, Seifert, Nezval, Bednár, Horst,* la humuristo *Jirotka,* el trezorejo de ĉeha literaturo Karel Hynek *Mácha* en la traduko de Tomáš Pumpr.

Ni salutas la denovan aperon de Panoramo kvazaŭ elprovo por krei, por kolekti beletristikan materialon de nova ĉeĥa Parnaso.

Poemoj, prozoj, muziktekstaĵo, parodio, kritikaj notoj kaj grafikaĵoj karuselas bele, harmonie en la valora beletristika volumo. La redaktoro Kníchal pridiskutas larĝaspekte (nur laŭ ĝia titolo „kelkaj notoj"...) la valorojn de la literaturaj kritiko kaj historio en Esperanto, koncerne la dilemon inter la originala kaj traduka literaturoj en Esperanto. Li citas multfoje la hungaran literaturiston, nian L. *Totsche—Tárkony,* kiu en Literatura Mondo substrekas, ke la nacio estas „pli antaŭ ol la ideo kaj lingvo" — do, kreadi internacie, sed ne eksternacie — notas Kníchal en sia altvalora studaĵo, laŭ kiu la Esperanta literaturo estas internacia pro tio, ke al ĝi kontribuas diversnaciaj aŭtoroj. Ni konsentas tion!

26-a Hungarlanda Esperanto-Kongreso

Hungara Esperanto-Asocio aranĝis la 26-an landkongreson la 25/27-an de junio 1976 en Komló. La plimulto da partoprenintoj (ĉirkaŭ 350) estis komprenebleh hungaroj, sed oni povis vidi inter ili eksterlandanojn el la socialismaj landoj, private kaj oficiale, eĉ la prezidanton de la Meksikia Esperanto-Asocio, Emilio *Arias*.

Akceptis la inviton de HEA la ĉefaj landorganizaĵoj, do sidis en la prezidantaro de la kongreso kiel reprezentanto de la Hungara Laborista Partio, Ferenc *Hercegh*, krome László *Ligeti*, vicprezidanto de la Landa Konsilantaro de Sindikatoj, Tibor T. *Kovács* el la Hungara Packonsilantaro, Róbert *Juhász* el la Hungara Popolfronto, kaj gvidantoj de departemento Baranya kaj urbo Komló.

Malfermis la kongreson Elizabeta *Pallós*, kiel prezidanto de LKK kaj de la Esperanto Teritoria Komitato.

Salutinte la kongreson János *Morber*, prezidanto de la konsilio de Komló diris: *„Mi dankas, ke vi akceptis nian inviton, kaj venis por soleni kun ni la 25-an datrevenon de la urbiĝo de Komló, ĉar kiel ankaŭ vi scias, nia urbo ricevis la urbo-rangon en 1951, Per nia invito ni volas esprimi, ke ni konsentas kun vi, laŭ nia embleco ni subtenas vian klopodon ..."*

Imre *Kutas*, ĉefsekretario de HEA diris en sia festparolado: *„Esperanto-kongreso — landa aŭ internacia — ĉiam havas mobilizan efikon. Frata renkontiĝo donas eblecon mezuri la rezultojn, fiksi la taskojn, interŝanĝi la spertojn, priparoli la movadajn problemojn. Utile estas aktivigas la membraron kaj post la kongreso plj konscience, surbaze de la akiritaj spertoj ili daŭrigos la movadon vivon. La kongreso donas eblecon por vidi, sperti, ke nia movado vivas kreskas kaj fortiĝas ...*

Nia Asocio ricevas oficialan helpon kaj materialan subtenon de la Sindikata Konsilio. Libere ni laboras por Esperanto. Tio signifas senliman eblecon kaj klare fikseblajn taskojn. Multe da taskoj atendas nin! La plej urĝa kaj grava estas junigi la movadon. La movado postulas novajn, freŝajn fortojn. Tiam estis la movado la plej forta, kiam ĝi konsistis plejparte el junuloj. Kuraĝe ni konfidu taskojn al la junuloj, ke ili lernu kaj ekzercu la gvidadon.

La plej gravaj aliaj taskoj estas: instrui la lingvon, aktivigi la membraron, varbi novajn Esperante parolantajn membrojn ..."

La Knabina Esperanta Horo de vilaĝo Bóly antaŭ la memortabulo de la Esperanto-plac

La florkronado de la statuo de martiro József Taksony (Festparolas E. Pallós)

En la unua tago de Kongreso oni inaŭguris *Esperanto-placon* meze de la urbo kaj la *buston de József Taksonyi*, martiro de hungara laborista movado, kiu estis esperantisto, kaj la *ekspocicion de Esperantaj libroj* el la privatkolekto de Károly *Fajszi*.

Estis interesa kaj grava okazintaĵo de la Kongreso, ke laŭ la iniciato de Hungara Vivo unue rekontigis esperantistaj redaktoroj el la Eŭropaj socialismaj landoj. La kunsidon partoprenis: *Bulgara Esperantisto:* Kunĉo *Valev*, ĉefredaktoro; *der esperantist:* Werner *Pfenning*, kunlaboranto; *Hungara Vivo:* Mihály *Gergely*, ĉefredaktoro kaj Aurél *Ponori Thewrewk*, ĉefkunlaboranto kaj d-ro Ottó *Haszpra*, d-ro István *Ferenczy*, d-ro Lajos *Molnár*, Antal *Münnich*, d-ro Árpád *Rátkai*, kunlaborantoj; *Pola Esperantisto:* Jerzy *Uspienski*, ĉefredaktoro; *Starto:* Oldrich Knichal, ĉefredaktoro.

La partoprenintoj diskutis la komunajn problemojn de redaktado, kaj kiamaniere povos pliboniĝi siajn amikajn kontaktojn. Ili konsentis, ke necesas de tempo al tempo ŝanĝi spertojn, informi unu la aliajn pri la plej gravaj iniciatoj, ekzemple la parlamenta agado de *Világ és Nyelv (Mondo kaj Lingvo)*, la iama Eszperantó Magazin. Eksterlandaj kolegoj petis, ke ili ricevu en Esperanto la plej gravajn artikolojn de la hungarlingva revuo „Lingvo kaj Mondo", ĉar — laŭ ilia opinio — multaj publikaĵoj estas komunikindaj kiel sekvenda paŝo.

En la kunsido de redaktoroj la hungaraj kunlaborantoj fondis *Amikan Rondon de „Mondo kaj Lingvo"*, ke oni povu planonigi sian laboron, uzi kaj utiligi la nuntempajn eblecojn, kiujn prezentis al nia afero la enlandaj kaj eksterlandaj cirkonstancoj.

La konservado de la pureco de niaj akvoj estas unu el la bazaj taskoj de la medioprotektado

Verkis d-ro Ferenc László:

En la lastaj jaroj la medioprotektado iĝis centra problemo de la internacia interesiĝo. Ties klarigo estas, ke preskaŭ en ĉiu regiono de nia Tero aperis tiuj nocaĵoj, kiuj danĝerigas la homan vivon.

La evoluo de la teknika-scienca revolucio alportis signifajn ŝanĝojn en la rilatoj de la homo kaj la medio. La homo transformas sian naturan medion ekde kiam li vivas en socio. Unue li devis sin mem defendi kontraŭ la nocaj efikoj de la naturo, poste paralele kun la evoluo de civilizacio li transformas sian ĉirkaŭaĵon por plenumi siajn funkciojn produktajn, trafikajn ktp. Dum multaj jarmiloj tiu efiko estis tre sensignifa kaj ĝi disvastiĝis nur sur bagatela ono de la biosfero.

La industriiĝo, poste la elformiĝo de la maŝinizita grandindustrio kaj fine la disvolviĝo de la erao de scienca-teknika revolucio eskterordinare akcelas la natur-transforman agadon de la homaro, kiu alportas utilan rezulton por la socio, — sed samtempe aperadas en konstante kreskanta mezuro la simptomoj de la „arta medio" efikantaj nocige laŭ vidpunktoj homa, biologia kaj fiziologia.

Popoloj de la mondo ne povas rigardi indiferente la mediajn nocojn, ĝuste tial, ke la polucio de la aero, akvo, humo ne estas limigigebla sur la proksimaĵo de la fokuso de polucio, ĝi ja rilatas landojn, pli grandajn teritoriojn, eĉ kontinentojn, kaj granda parto de la nocantaj polucioj — ekz. malpuriĝo de aero, akvo — disvastiĝas sendepende de la administraj, geografiaj limoj.

Tiu mondmezura agado, kiu disvolviĝis por protektado de la homa medio, — ankaŭ en Hungario metis tiun demandon sur fronton de interesiĝo.

Nia jurkonstruado atingis signifajn rezultojn en la pasintaj dekkvin jaroj sur tereno de la medioprotektado. Aperis pluraj jurpreskriboj, sur kies bazo okazas altnivelaj laboroj en intereso de la ekonomio de akvoprovizo, de protektado de akvokvalito, kaj konservado de naturaj valoroj. Okazis nombraj disponoj por protekti la purecon de aero, fortiĝis defendo kontraŭ la poluciiĝo de grundoj, krome por manipulado, prilaboro, sennocigo de mastrumadaj defalaĵoj.

La medioprotekta leĝo promulgita en lasta tempo far la parlamento atestas pluan antaŭpaŝon en nia jurkonstruado servanta la eliminadon de la mediaj nocoj danĝerigantaj la homan vivon. La leĝo metas la homan medion en ĝia kompleksecо sub juran protekton kaj difinas fundamentan celon de la medioprotektado valida por ĉiuj elementoj de la medioprotektado. La leĝo akcentas tiun jurdecidan motivon, ke paralele kun la intensiva konstruada laboro, kiel ties organikan parton oni devas solvi la diversajn medioprotektajn taskojn.

En nia artikolo ni ne intencas okupiĝi pri ĉiuj temoj apartenantaj al la medioprotektado, sed ni deziras doni resumon pri unu el la plej gravaj faktoroj: pri la demando koneksa kun la konservo de la akvokvalito.

La rolon de la akvo ja eĉ hodiaŭ oni ne povus pli bone koncepti, ol tion faris Goethe en la sekvaj linioj citataj el *Urfaust* (parto II./2.):

> La akvo estis prafonto de l'esto!
> Ĉion akvo vivigas, subtenas!
> Oceano! via forto ĉiam benas.
> Se vi por nubo ne vaporus,
> rojon per akvo ne favorus,
> rivero jam plu ne sinuas,
> kaj la torento ne plu fluas,
> kion valoras tero, kampo, monto?
> Vi nutras la freŝon de l'vivofonto.

La rolo kaj signifo de la akvo el vidpunkto de la mediaj efikoj

Inter la kadroj de la protektado de natura medio okupas eksterordinare gravan lokon la akvo pro sia multbranĉa signifo. Nome tiajn vastajn teritoriojn de nia ĉiutaga vivo kaj mastru-

Pilkludo en la krepusko

mado eble eĉ unu natura faktoro ne tiom penetras, kiom la akvo. La evoluado de la retoj de kolonioj, la transformiĝo de la ekonomi-historio de la landoj estis ĉiam funkcio de la ĉeesto de akvo. Sur hodiaŭa nivelo de la socia kaj ekonomia evoluo iĝis ĉiam pli akra la luktado **por** la akvo kaj **kontraŭ** la detruigaj fortoj de akvo.

Malgraŭ ke estas grandega la akvokvanto de la Tero — 1,3 miliardoj da km^3 — la senpere utiligebla dolĉa akvo estas nur 0,5% de tiu akvoamaso, sed granda parto de tiu akvoamaso estas poluita.[1] La poluado ŝanĝas la animalan regnon de la akvoj kaj en pli vasta senco ankaŭ la homan medion. Jam en nia tempo kaŭzas gravan akvomankon sur iuj teritorioj krom la akvopoluado la malegala area kaj tempa distribuiĝo, — kontraŭe al la aero, kiu ne kaŭzas problemon el vidpunkto de la kvanta ekonomio.

Kiajn damaĝojn povas krei la poluado de akvoj, la forŝoviĝo de la ekvilibro en la akva vivo? Tiun demandon ni povas respondi, se ni priatentas kelkajn terenojn de utiligo de akvo.

Kiel elemento de ekzista graveco la akvo estas kondiĉo nemalhavebla en ĉiuspeca vivo. La homo pli facile povas elteni mankon de nutraĵo, ol tiun de akvo. Ĉe certa grado de soifo — kiu estas diversa inter la animaloj — ĉiu alia bezonaĵo eklipsiĝas.

Eĉ la „soifo" de la industrio estas malfacile kontentigebla, ĉar la pretendoj saltograde kreskas, sed la akvorezervoj estas limigitaj.

Ankaŭ la agrokulturo — produktanta bestojn, kreskaĵojn — ne povas ekzisti sen akvo. Tial es-

1. *polui:* malpurigi la vivmedion

Fiŝkaptado: trankvilo pacienco ...

tas malutila ankaŭ por la agrokulturo la poluiĝo, noca por la la vivo de akvoj.

La akvo, ankaŭ kiel refreŝiga faktoro, havas gravan rolon en la vivo de homo.

La homo ne deziras daŭre vivi sur kalvaj teritorioj, dezertoj aŭ karstaj altaĵoj, despli li sopiras restadi apud lagoj situantaj en pentrinda ĉirkaŭaĵo, kaj ĉe riveroj borderitaj per arbarstrioj. Kontraŭ la ripoziga ĉirkaŭaĵo la homo havas estetikajn dezirojn. Ĉio, kio ofendas la estetikan senton — tiel la poluita, malpura akvo, — efikas misagorde. Perdas sian celon la refreŝiĝo, ripozado en tia medio, la homo ne povas akomodiĝi kaj senigi sin de maltrankviloj, de zorgoj.

Kiam iĝis problemo la ŝirmado de akvokvalito?

En tiu tempo, kiam la akvojn influantaj homdenevaj malpuraĵoj ankoraŭ ne superpaŝis la naturdonitajn limojn, la akvokvalito ne jam kaŭzis zorgojn. La pliiĝo de la loĝantaro, ĝia akumuliĝo en urbojn kaj la koncentrita apero de poluitaj akvoj vekis la atenton pri la akvokvalito, kune kun la disvastiĝo de epidemioj. La tiamaj klopodoj por venki la proakvajn epidemiajn malsaniĝojn estis direktitaj plie por plibonigi la higienajn cirkonstancojn por akiri akvon, kaj por desinfektigo de akvoj, — ol por lokigi ien la akvon kaj purigi ĝin.

La organizita ŝirmado de akvokvalito elvolviĝis, kiam grandaj akvomasoj poluiĝis. La elformiĝo de la fabrika grandindustrio, evoluado de urboj, ŝanĝo radikala de la vivcirkonstancoj re-

zultis la impetan altiĝon de la uzataj akvokvantoj kaj kune kun tio la kreskon de la estiĝintaj poluakvoj kaj variecon de ties konsisto. La poluiĝo de riveroj en kelkaj industri-regionoj de Eŭropo estiĝis tiom grandmezura, ke pro la limigo de la akvouzado tio iĝis malhelpilo de plua evoluado — jam komence de nia jarcento. En la erao de industria ekprospero la afero de akvokvalit-ŝirmado iĝis centra problemo de la akvomastrumado, akuta problemo de niaj tagoj. La eksploda apero de socia neceseco por ŝirmado de akvokvalito estas kompleksa rezultato de reciproka efikado de la industria produktado, de vivcirkonstancoj kaj vivpretendoj, kune kun higienaj postulaĵoj.

Efiko de la polu-akvoj je la kvalito de akvoj

La malutilajn ŝanĝojn de la natura akvokvalito kaŭzas diversaj poluaj efikoj. La kvalitoj povas esti diversaj laŭ karaktero de la poluakvoj. Tiujn ni grupigas laŭ iliaj estiĝoj kaj tiel ni povas paroli pri doma (urba) kaj pri industriaj poluakvoj.

La domaj poluakvoj devenas el la hejmomastrumadaj akvouzadoj (bano, lavo de vestaĵoj kaj de manĝilaroj). La urbaj polucioj krom tiuj de la hejmoj enhavas la poluakvojn de publikaj institucioj, de lokaj industribranĉoj. En kelkaj urboj aldoniĝas la pluvoj, ĉar ankaŭ tiuj estas kondukataj tra la kloakkanaloj. La konsisto de la industriaj akvoj dependas strikte de la fabrikitaj produktoj kaj de fabrika teknologio, do kvalite tiuj estas tre variaj. El tio sekvas, ke diferencigo laŭ la devenejo samtempe difinas la kvalitan diferencon de poluakvoj.

La poluakvoj havas propre du grandajn grupojn:

a) akvoj poluitaj per dominante putriĝantaj, organikaj materioj,

b) akvoj poluitaj per diversaj kemiaĵoj.

Por kompleteco ni mencias, ke estas ofta la ĉeesto de neorganika, ŝvebanta sedimento, kiu naskiĝas ĉefe pro minej-ekspluatado, aŭ el la konstru-industrio. Tiujn — kvankam okaze povas kaŭzi gravajn modifojn en la fluujoj — ni ne rigardas poluakvoj, ĉar ili ne influas noce la naturajn kemiajn konsistilojn de la akvoj.

Akvorezervujo de Pátka



Urbaj poluci-akvoj

La organikaj, diskonsistiĝaj, putremaj poluciaj akvoj — kiel la urbaj kaj iuj industriaj poluakvoj — montras siajn nocajn influojn en la akcepta akvo per la rompo de la ekvilibro de oksigenproporcio. La salubra pura akvo konforme al sia temperaturo estas saturita per solvita oksigeno.

Pro enkonduko de poluci-akvo la oksigenenhavo abrupte malpliiĝas. Nome la organikaĵ-enhavo de tiuj akvoj donas bonegan nutromedion, vivkondiĉojn por la diversaj mikroorganismoj (ĉefe bakterioj). La bakterioj inter tiuj favoraj nutrokondiĉoj rapide multobliĝas, dum sia vivaktivado foruzas oksigenon, kiun ili prenas el la akvo. La bakterioj tre utile agadas en intereso de la akvopurigado per tio, ke la organikajn materiojn transformas en la procezo de metabolo je mineralaj materioj. La tiel formiĝintajn kombinaĵojn utiligas denove aliaj animaloj kaj vegetaloj, ekz. la algoj uzas la naskiĝintan karbonan dioksidon pro efiko de la sunradioj por konstruado de sia protoplasmo. Dume ili transdonas al la akvo proporcian kvanton da oksigeno kaj per tio ili plibonigas la oksigenekonomion.

La mikro- kaj makroorganismoj subtenas sian vivon nutrante sin per organikaj kaj neorganikaj materioj, resp. unu per la alia, kaj ili multobliĝas proporcie kun siaj viveblecoj. Dume ili foruzas la poluciojn nocantajn la akvojn kaj tiel ili purigas la akvon. La tiel konsumita oksigeno

La lago Herman Ottó en montaro Mecsek

ĉe la kontakta surfaco de akvo kaj aero substituiĝas, en la oksigenmastrumado de la akvo la ekvilibro restariĝas sana kaj natura. Tion ni nomas la procezo de natura mempuriĝado. Per tio sin defendas la naturo kontraŭ la poluciaj efikoj kaj en la ĉiam renoviĝanta ciklo de la malkonstruo-konstruo ĝi certigas, ke la poluaĵoj koncentriĝu. La mempuriĝon okazanta en ĉeesto de necesa kvanto da oksigeno oni nomas procezo **aerobia,**[1] kaj la mikroorganismojn, kiuj faras la malkonstruadon oni nomas aerobiaj bakterioj.

Sed: en la akvo la solvita oksigeno ne staras je dispono nelimite. Ankaŭ la substituigo de la oksigeno estas inter limoj donitaj de la naturo. La allaso de forte poluita akvo, — aŭ de poluakvo en kvanto rilate granda — povas krei tian situacion de la akceptanto, ke mikroorganismoj foruzas en ĝia plena kvanto la oksigenon solvitan en la akvo, eĉ tiu oksigeno montriĝas nesufiĉa. Per tio la akvo atingas la plej malbonan staton. Jam dum la periodo de malpliiĝo de oksigeno, se la oksigenkvanto malpliiĝas sub 3—4 mg/litro, la animaloj de pli altaj ordoj — unuavice la fiŝoj — ekstermiĝas, „sufokiĝas". Se la oksigenenhavo plu malpliiĝas, ankaŭ la animaloj de pli malataj ordoj laŭvice neniiĝas — laŭ ilia rezistokapablo. La detruiĝintaj organismoj pliigas ankaŭ la organikaĵo-ŝarĝon de la akvo do la stato akumuliĝante malboniĝas. La rivero iĝas morta akvo, sed la procezo de malkonstruo ne ĉesas.

Aperas novaj specoj de bakterioj en la akvo, kiuj provizas sin per oksigeno el la organikaĵoj. La malkonstruiĝo okazas sen aero pro la anaerobiaj[3] bakterioj. Sekve de la vivaktivado de tiuj bakterioj naskiĝas gasoj, inter ili sulfohidrogeno, kiu estas tre fetora. Tiaj tersurfacaj akvoj prezentas draman scenon.

La poluitaj industriaj akvoj enhavantaj ĉefe organikaĵojn kreas en la akceptanta akvo similajn cirkonstancojn, la malkonstrua procezo estas sama. Tian polu-akvon eligas la nutraĵindustrioj (lakto-, viando-, konservaĵ-, suker-, bier-, ktp. fabrikoj) kaj iuj leĝerindustrioj (ledo-, ĵino-, kanabo-, paper-, ktp. fabrikoj).

La mezuro de la organikaj polucioj en la akcepta akvo estas konstatebla laŭ la indeksoj de la oksigenekonomio: — solvita oksigen-enhavo, biokemia oksigenbezono, oksigenkonsumo. — La mezuron de la ŝarĝado de poluakvoj kondukitaj en la akvofluoj, krome la procezon de la mempuriĝo karakterizas la oksigenlinio, kiu montras la solvitan oksigenenhavon de la akvo en diversaj distancoj for de la polucio-fonto. La ekzamenoj direktataj je tio estas gravaj laŭ vidpunkto de la akvokvalit-ŝirmado, ĉar laŭ tiuj estas difineblaj la necesaj preskriboj por la manumado de la polu-akvoj kaj ŝarĝebleco en la akcepta akvo.

La Kössöni-valo

Kiel interesaĵon ni mencias, ke pri la grado de poluiteco ni povas konkludi surbaze de la organismoj vivantaj en la akvoj. Ĉeesto de tiu aŭ alia animalo karakterizas la purajn, la modere, aŭ forte aŭ eksterordinare malpuriĝintajn akvojn.

Kvankam la organikaj malpuraĵoj povas estigi gravan situacion en la akceptaj akvoj, tamen ni devas konstati, ke tiuj estas rilate malpli danĝeraj ol ceteraj poluciaj materioj. La puriĝo koneksiĝas al la spontanaj procezoj renovigantaj la naturon per si mem, kaj tio estas akcelebla per jam konataj homfaritaj intervenoj. Pli forte influas la kvaliton de akvoj la poluciaj efikoj de industrio. (X)

(Finota en sekva n-ro.)

Tr.: A. Pechan

---

1. *aerobia:* postulante oksigenenhavan aeron por vivi (PIV)
2. *malaerobia:* vivanta sen aero
3. *anaerobia:* ne kapabla vivi en aero

„Jam penetris en la parlamenton de multaj landoj...“

Eksterlandaj leĝdonantoj por la Internacia Lingvo

Al kio oni instigis 16 kabinetojn?

En nia artikolo ni provas doni bildon pri tio, kiamaniere apogis la eksterlandaj leĝdonantoj la universalan homaran aferon de nia movado. Ĉar mankas al ni la plena dokumentado, ni povas doni resumon nur pri parlamentoj de kelkaj landoj kaj pri la agadoj, manifestadoj de unuopaj kelkaj deputitoj. Ankaŭ tio signas, ke la ideo de la internacia lingvo jam penetris en la plej altajn forumojn de multaj landoj.

Postmilite en jaro 1921 en la dua kunsido de la Ligo de Nacioj jam 13 ŝtatoj apogis la lernejan instruadon de Esperanto. Ankaŭ la konferenco tial okazis en Ĝenevo en 1922 pri tiu problemo. Tiun konferencon partoprenis krom pedagogoj el 28 landoj ankaŭ delegitoj de 16 kabinetoj, kaj estis akceptita komuna manifesto.

Tio efikis, ke en pluraj partoprenintaj landoj komenciĝis nedeviga lerneja instruado de la internacia lingvo. Post la favoraj spertoj Ligo de Nacioj en 1924 proponis, ke Esperanto, kiel klara peranta lingvo, estu uzebla en la internacia telegrafa komunikado. Tion akceptis en 1925 la internacia poŝta kontrakto.

Do estas memkomreneble, ke jam la menciitan rezolucion de Ligo de Nacioj kaj manifeston de la Ĝeneva konferenco antaŭis la proponoj kaj instigoj de la parlamentaj deputitoj en la landoj apogantaj Esperanton, — kaj tio efikis, ke tiuj kabinetoj vanis al la skizita apogo de la internacia lingvo.

La 4-an de aŭgusto 1929 la grava postmilita burĝo-liberala jurnalo de titolo *„Magyarság”*, en la suplemento de sia dimanĉa numero publikis kolumnan artikolon kun titolo „La problemo de la mondlingvo” el plumo de la tiama Finnlanda ambasadoro en Hungario, d-ro Emil *Setälä*, universitata profesoro, rajtigita ministro.

La jurnalo en sia enkonduko al la artikolo prezentis la konatan finnan lingviston, kiu tre bone parolis Esperante, en kiu lingvo li verkis sian artikolon poste aperinta en la traduko de d-ro Kolomano Kalocsay. En la menciita enkonduko estis inter aliaj: „La finnoj jam de kelkaj jaroj tre forte disvastigas Esperanton, la parlamento jam trifoje aprobis subvencion al la Esperanta Instituto.

Kion proponis la skandinavoj?

Cetere profesoro Setälä estis finna ministro ankaŭ de la publika instruado en 1925. Jam tiam li estis preta subskribi en la nomo de sia patrio interŝtatan kontrakton pri la deviga lerneja instruado de Esperanto, se almenaŭ 6 landoj estus subskribontaj tion. Bedaŭrinde la enkondukon de la deviga instruado tiam ankoraŭ ne entreprenis aliaj kabinetoj.

Ankaŭ parlamentaj agadoj antaŭis la sintenon de pluraj kabinetoj, kiam oni prezentis la internacian peticion, apoganta Esperanton al Unesko. Tiel naskiĝis en 1954 en la Montavidea asembleo de Unesko tiu rezolucio, kiu:

„Notas la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo; rekonas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko.”

Notas, ke pluraj Ŝtatoj-Membroj informis pri sia preteco enkonduki aŭ ampleksigi la instrualon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj, kaj petas tiujn Ŝtatojn-Membrojn informadi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo;

Instrukcias la Ĝeneralan-Direktoron sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo, kaj tiucele kunlabori kun Universala Esperanto Asocio en aferoj koncernantaj ambaŭ organizajojn.”

En Italio Franco *Nicolazzi*, socialdemokrata deputito, kiu poste fariĝis anstataŭanto de la sekretario de sia partio, prezentis leĝprojekton en la parlamento pri la lerneja instruado de Esperanto. Tiun projekton sankciis la parlamenta instrukomitato, — sed kiam tio estus pridiskutata en la senato, tiam jam senvalidiĝis la mandato de la leĝdonado.

En sekvonta jaro, la Sveda Parlamento jam donis ĉiokoncernan internacian proponon por solvo de la problemo, — eĉ ofertis la plej racian procedon gvidantan al tiu celo. Ambaŭ svedaj parlamentoj la 10-an de marto 1965 per unuanima decido komisiis la Svedan Kabineton, ke ĝi klopodu fondi tiun internacian sciencan komitaton ĉe UNO aŭ Unesko,

kiu objektive rekontrolus la lingvajn problemojn de la internaciaj rilatoj kaj proponus definitivan solvon por la enkonduko de la neŭtrala, laŭkontrakta mondlingvo. La parlamenta komitato, kiu preparis tiun rezolucion, konstatis: tio estas la nuna nepreco, ke por subteni la internaciajn rilatojn, estas devige studi diversajn lingvojn. Tio estas tre granda ŝarĝo por la plimulto de la popoloj, ĉefe por la malgrandaj popoloj, kiel la sveda.

Sekve de la rezolucio la sveda kabineto transdonis sian tiurilatan proponon al la sveda Unesko-Komitato. La skizitan svedan proponon oni alsendis al la Ĝenerala Direktoro de Unesko. Tion apogis ankaŭ la Unesko-Komitatoj de aliaj skandinavaj landoj.

Kiuj torpedis tion?

Kio estis la sorto de la sveda iniciato? Ni ne scias precize, sed estas verŝajne, ke ĝian realigon malhelpis *ne* la Ĝenerala Direktoro de Unesko. Plej verŝajne la tielnomataj mondlingvaj grandpotencoj, por gardi siajn lingvajn privilegiojn, kiuj donas al ili intelektan influon.

Malgraŭ tio preskaŭ en ĉiu lando kreskas la anaro de Esperanto-Mondmovado. La Japana Esperanto-Asocio ekzemple komence de la jaro 1966 tutlande kolektis 250 mil subskribojn al tiu peticio, per kiu ĝi turnis sin al la parlamenta instrukomitato. Ili almetis al la petskribo la anticipan apogan deklaron de dek parlamentanoj de la komitato. La celo de ilia agado estis ekmovi la enkondukan procedon por instruado de E en lernejoj.

Tahar Haruji, socialista deputito prezentis al *Nakamura,* tiama kulturministro proponon enhavantan tri punktojn. En ĝi li priskribis la diversajn avantaĝojn de la internacia lingvo super la naciaj fremdaj lingvoj, instruitaj en japanaj lernejoj, — kiujn lingvojn ne povas bone alproprigi la junularo. Li kritikis la instrupolitikon pro tio, ke oni devigis la instruadon de la angla linvo en mezlernejoj. Severe li prijuĝis la amerikanizadon de la japana kulturo, ĝuste ĉar la politiko kaj diplomatio — laŭ li — jam sen tio estas sub la gvido de Usono.

La japana parlamentano debatis la formalan, indiferentan respondon de la ministro. Li proponis, ke la instruado de fremdaj naciaj lingvoj estu deviga nur sur specialaj laborterenoj. Plue li proponis fondi komisionon de fremdaj lingvoj por kontroli la instrudemandojn, koncernantajn la fremdajn lingvojn kaj Esperanton, — kaj antaŭ la decido pri tiu lasta estu priatentita ankaŭ la publika opinio. La ministro denove evitis doni konkretan respondon, kaj opiniis ankaŭ tiun temon kontrolenda tasko en la futuro.

Post tio la Japana Socialista Partio, la plej forta opozicia partio de la lando, en nov. 1966 prezentis sian projekton por reformi la instrusistemon. En tio inter aliaj oni fiksis, kiel celon: la enkondukon de la deviga instruado de E por la 8—12 jaraj infanoj.

Kion subskribis 1359 deputitoj kaj 114 ministroj?

La okazintaj iniciatoj en la diversaj parlamentoj de la mondo instigis UEA-n al nova agado, — kaj ĝuste en j. 1966, ĉar UN deklaris tiun jaron de la Internacia Kunlaboro. Tiam UEA helpe de grandioza subskribo-kolektada laboro, turnis sin al UN per internacia memorando. Ties kerno kaj konkludo estis: „... ni proponas, ke UN solvu la lingvan problemon per efika efektiva helpo al internacia lingvo Esperanto, kaj proponu ankaŭ al la Ŝtatoj-Membroj, ke ili akcelu ĝian instruadon kaj aplikadon en la internaciaj interrilatoj de popoloj.

La proponon aprobis imdividuaj subskriboj de pr. unu miliono da civitanoj el 74 landoj,-inter ili 1359 parlamentanoj, 114 ministroj, unu ŝtatestro (Franz *Jonas,* tiama prezidento de Aŭstrio). Inter la individuaj subskribintoj estis 995 lingvistoj, 6932 universitataj profesoroj, docentoj kaj akademianoj, plue 52 mil instruistoj de elementaj lernejoj kaj mezlernejoj. Krom tio estas speciale signifa fakto, ke la estraro de 3843 sociaj organizajoj el 74 ŝtatoj oficiale subskribis la memorandon ankaŭ en la nomo de sia anaro, rondcifere 71 165 000.

Kompreneble estis antaŭvideble, ke ankaŭ tio estos nur unu paŝo sur la vojo gvidonta al la celo,-kaj laŭ skizitaj indikoj oni povas rigardi tion tre konsiderinda paŝo.

La jam menciita Franco *Nicolazzi,* deputito de la Itala Socialdemokrata Partio en 1969 kaj en 1972, denove prezentis al la parlamento leĝproponon pri la lerneja instruado de E. Sed liaj iniciatoj ne ricevis tiam la bezonatajn parlamentajn voĉdonojn.

Post tio lia tuta partio ankaŭ oficiale subtenis la aferon de la internacia lingvo kaj ĝia centra partiojurnalo publikis en 1972 artikolserion pri la graveco de Esperanto.

En marto 1973 tiu partio jam turnis sin per oficiala propono al la Socialista Internacio, ke oni akceptu Esperanton komunika lingvo en la internaciaj rilatoj de socialistaj partioj kaj laboristoj. Samtempe ili konsilis al tiuj partioj, ke ankaŭ ili iniciatu en siaj parlamento la rekonigon de E kaj ĝian instruadon en lernejoj.

Tiun italan proponon jam subtenis la socialista partio de kelkaj aliaj landoj, inter ili la Franca Socialista Partio gvidata de F. *Mitterand.*

Kio okazis en la brita parlamento?

En la vico de eksterlandaj parlamentaj aktivadoj havas specialan signifon angla okazintajo. Komence de j. 1973, la Brita Esperanto-Asocio kun partopreno de cent parlamentanoj organizis enketon, kie 45 deputitoj esprimis sian simpation al E. Je la iniciato kaj kun la partopreno de tiuj lastaj fondiĝis la Grupo de Parlamentaj Deputitoj por Esperanto. Prezidanto estis elektita Davies *de Leek,* sekretarioj iĝis Ernle *Money* kaj Lewis *Carter-Jo-*

nes. Post la fondo de la grupo estis pluraj debatoj en la parlamentejo pri tiu temaro.

La celo de tiu grupo estas alvoki la atenton de la estraro de la brita parlamento kaj kabineto pri E, unuavice en la ĉiusemajnaj interpelaciaj tagoj por konvinki la kompetentulojn pri la graveco de la lerneja instruado de la int. lingvo. La ekzistado kaj agado de la Esperanto-amika grupo en la angla parlamento estas denove „golo" en la „pordo" de anglomaniuloj de la mondo, kiuj kredis tion ke la angla lingvo estas la plej taŭga internacia lingvo.

Post la menciitaj estu al ni permesate aludi al la lastjara enketo organizita en Kanada urbo Victoria, kie oni instigis plurajn parlamentajn deputitojn por deklari sian pozicion rilate Esperanton. El tiuj simpatiantoj Ian *Arrol*, la deputito de *York East* deklaris: „Mi pensas, ke via propono, kiun vi sendis al nia ministro pri eksterlandaj aferoj por enkonduki Esperanton en UN kaj en internaciaj konferencoj, estas produkto de eminenta kaj logika racio... Sed bedaŭrinde la mondon aŭ parlamenton ne estras nepre la racio kaj logiko."

Kial tio estus epokfara...?

Tiu lasta konstatado — kiom ajn aflikta — estas trafa al multaj parlamentoj kaj internaciaj forumoj. Malgraŭ tio ni opinias: la 1965-jaran iniciaton de la sveda kabineto kaj parlamento estus inde ripeti jam sur pli larĝa internacia tereno. Kelkaj socialismaj landoj kaj la Skandinaviaj ŝtatoj respektive la konsidereblaj kabinetoj de aliaj burĝaj ŝtatoj povus prezenti en la asembleo de UN tiun komunan projekton, ke en la kadroj de UN oni fondu internacian sciencan kombinaton. Al Esperanton bone konantaj lingvistoj, sociologoj, pedagogoj oni devus doni tasko, la objektivan kontrolon de la lingvaj problemoj en la int. rilatoj kaj de la taŭgeco de E, kiel interkonsentita internacia lingvo de UN.

Ni estas konvinkiĝintaj, ke tia internacia komitato scienca povus konvinki la plimulton de Ŝtato-Membroj en UN pri la escepta graveco de la internacia lingvo kaj pri neceso tutmonde enkonduki ĝian devigan instruadon. Tia monda kontrakto estus epokfara gesto. Tio ankaŭ grandmezure akcelus la unuavice vitalan aferon de la homaro, la subtenon de mondpaco, — respektive la pacan multflankan kunlaboron de landoj de diversaj sociaj sistemoj.

Tiucele Esperantoj-Asocioj de ĉiuj landoj devus iniciati la fondiĝon de leĝdonanta komitato por aktivado de la parlamento por antigi decidon similan al la peticio de Sveda Parlamento.

Imre *Szenes*
laŭ lia artikolo en
Eszperantó Magazin
(1975/6)
Tr. TI

Ĉion vi trovas
en Skála
Nova magazen'
senpara

SKÁLA

Ni atendas vin

en la nutraj-sekcio: inter la 7-a kaj 20-a horoj

en la industriaj-sekcioj: inter la 8-a kaj 19-a horoj

Dejorado: 850—850

Allessandro Bausani:

Historia panoramo de interlingvistiko kaj internaciaj valoroj de Esperanto

Ni citas el la enkonduka parto de la prelego de profesoro *Bausani*. Por ke la legantoj havu pli larĝan koncepton pri la temo, antaŭe ni donas mallongan resumon de la prelego.

La aŭtoro unue skizas tipologion de inventitaj lingvoj, poste sekvas mallonga historio de diverstipaj artefaritaj lingvoj, ekde »magiaj« lingvoj ĝis Esperanto kaj Interlingua de IALA. La tipologio kaj historio permesas poste al la aŭtoro simpligi la variegan panoramon de artefaritaj lingvoj, elektante nur la vivkapablajn formojn, kiuj fakte limiĝas al tri: Esperanto, Interlingua de IALA kaj Occidental. Poste li studas la strukturon de Esperanto el la vidpunkto de formala tipologio kaj funkcia tipologio, montrante, ke Esperanto strukture taŭgas ne nur kiel esprimilo de homoj parolantaj hindoeŭropajn lingvojn, sed ankaŭ bone estas analizebla de popoloj, uzantaj aliajn tipojn lingvistikajn. Fine la aŭtoro kritikas kelkajn difektojn ne de Esperanto mem, sed de kelkaj okcidentaj esperantistoj, kiuj uzas la lingvon ankoraŭ laŭ Eŭropa maniero; fine li esprimas la esperon, ke per uzado, fare de kiel eble plej grandaj popolamasoj neeŭropaj, Esperanto akiros ankaŭ strukture novan, vere internacian kaj universalan stadion de sia evoluado.

...Pri kio okupiĝas lingvisto? Oni diras kutime: »pri la lingvistika *signo*«. Sed lingvistika signo, t. e. la produkto de la lingva ago en ĝia pleneco, ne estas kiel aliaj signoj ekzemple gesto, helpsignalo ktp. io tute neanalizebla: male, ĝi estas io analizebla. Oni povas disigi ĝin en morfemoj, vortoj ktp., »lingveroj« ankaŭ tiujn oni nomas, uzante dusencan terminon, lingvaj aŭ lingvistikaj *signoj*, dum ili ne estas signoj, sed funkciaj elementoj aŭ pli E-e *funkcieroj* de la lingvistika signo; ilia eco kaj esenco estas funkciado en supera amplekso. Kaj tiuj „eroj" ne estas funkciaj elementoj tute aŭtonomaj, kies sumo rezultigas la lingvistikan signon, sed elementoj, kiujn oni povas konsideri ekzistantaj nur kiel funkciantaj en ĝi (en la lingvistika signo). Por eviti la dusencecon de la vorto »signo«, *Lucidi* proponis nomi tiujn »funkciajn unuojn« *»iposematoj«* (E-e eble *signeroj*). Do, lingvisto okupiĝas ne pri la lingvistika signo, sed pri la iposematoj aŭ lingvistikaj *»signeroj«*. Tio klarigas, kial lingvistoj kutime sentas sin ĝenitaj, kiam ili devas studi la tiel nomitajn *»olofrastikajn«* esprimojn (ekz. jes, *ne, ankaŭ*, ktp.), kiuj efektive ne estas iposematoj (signeroj), sed signoj.

Tiu diferencigo inter »signo« kaj »signero« ne estas nur termina, sed enhavas multajn gravajn konsekvencojn; per tio, ekzemple, oni komprenas pli bone la tradician antipation kaj eĉ ĝenon de oficiala lingvistika scienco antaŭ du problemoj: la problemo de la *deveno aŭ origino de lingvoj* (aŭ de lingvokapablo), kaj la problemoj koncernantaj *la artefaritajn lingvojn*. Nome, la problemo de la deveno de la lingvoj temas pri la origino de la lingva *signo*, ne de la lingvaj signeroj (kies origino estas pensebla nur en la amplekso de la lingvistika signo, en kiu ili funkcias kaj kiun ili iel antaŭsupozas); dum la problemo de la artefaritaj lingvoj temas ne tiom pri la kreado de novaj signeroj (iposematoj), sed, en ĝiaj plej ambiciaj klopodoj, pri la kreado de novaj lingvaj *signoj*.

Vidante la tutan aferon el tiu ĉi vidpunkto, la lingva inventemo ŝajnos — en ĝia unua aspekto — kiel artefarita simiado de kelkaj fenomenoj de la natura historio de veraj lingvoj, lingvistike studebla nur kiel eksternormaĵo de la lingvistika ago; ankaŭ en ĝia dua kaj pli ambicia aspekto, ĝia studado eliros de la propre nomita »lingvistiko«, por eniri en la amplekson de la religia aŭ psikologia problemaro (magiaj formuloj, retrovo aŭ invento aŭ reinvento de la Adama pralingvo ktp.), aŭ de sociologio (invento de internaciaj helplingvoj aŭ la »interlingvistiko«).

Sekve, povas esti utile skizi eblan teorian tipologion de la lingvistika inventkapablo. Oni povus, unue, desegni elementan tipologion bazitan sur la jam menciita poluseco de lingvo kiel *esprimo/arto* kaj kiel *rilato/komunikado*. En aliaj vortoj, oni povus inventi lingvojn tute aŭ kvazaŭ tute esprimaj/artaj por poeziaj aŭ esoterismaj celoj, lingvojn kiuj estos ofte neregulaj, malfacilaj, (kiel iaj lingvoj de primitivaj sekretaj societoj, ekzistantaj ankaŭ en nia mezepoko, aŭ kiel ludlingvoj infanaj kaj knabaj, aŭ lingvoj de psikaj malsanuloj ktp. konsiderante kiel plej grava la aspekton de rilato/komunikado, ni trovos lingvojn celantajn internacian interkomprenon (la propre nomitajn internaciajn lingvojn kiel, inter aliaj, Esperanto).

Do oni povus imagi du direktojn de lingva inventemeco: direkton de sanktuma tipo, aŭ vertikalan; kaj alian, horizontalan aŭ laikan. Krome, en ambaŭ direktoj oni povus imagi pluan partiĝon kaj oni povus postulati kvar tipojn de inventitaj lingvoj:

A (sanktumaj):

1. sanktuma kvazaŭlingvo (glosolalio, magiaj formuloj);
2. artefarita sanktuma lingvo (Balaibalan).

B (laikaj):

1. pure ludesprima artefarita laika lingvo (ekz. lingvoj inventitaj de knaboj aŭ paranojuloj);
2. artefarita lingvo por komunikado praktika.

Do, oni povas skibri aŭtonoman historion de »inventitaj« lingvoj, pritraktante el la sama vidpunkto ĉiujn tipojn, de la ŝamanaj lingvoj ĝis Esperanto kaj Interlingua, montrante ke eĉ Esperanto kaj Interlingua estas laika moderna aspekto de la sama evoluado, sammaniere kiel la moderna kerna fiziko estas laika moderna aspekto de la alkemio, sen tiel malpligrandigi ĝian gravecon.

La prelego, kies fragmenton ni donas, estis laŭtlegata far prof. Bausani dum la Interlingvistika Konferenco en Budapeŝto.

Paĝo de FERI'

GRAVA ELDONAĴO



El inter la eldonaĵoj de Libroeldonejo Corvina gravan lokon okupas la libro: „Libero kaj Amo" de Sándor Petőfi, Poemoj elektitaj en traduko de Kálmán Kalocsay.

En nia enigmo ni citas la lastan strofon de la poemo: Kanto de lupoj, en la vicoj 1. horizontala kaj 24., 50., 1. vertikalaj. Ensendi sufiĉas nur la citaĵon ĝis la 1-a de oktobro.) Inter la solvintoj ni lotumos premiojn.

Horizontalaj linioj: 13. La unua el la du epopeoj de Homero, pri la bataloj sub la muroj de Trojo. 14. Demanda adverbo. 15. Apartenanta al iu. 16. Ŝtofa strio por ĉirkaŭvolvado. 17. Mondfama germana idealisma filozofo (Immanuel, 1724—1804). 18. Rilata al iu metalo. 19. Objekto por parte enigi en ĝi alian objekton. 20. Titolo de E. revuo. 21. Promena plezura boato (Radiko). 22. Masklo de animalo. (R). 23. Streĉi la korpajn aŭ spiritajn fortojn, por atingi rezultojn. 24. Posedanta la plej noblajn ecojn de la homo, kompatemon, bonfaremon kaj helpemon. 25. Ekstremoj de amo. 26. Mallonga memoriga enskribo. 27. Balanceti infanon (R). 28. Motoro de la korpo. 29. Ero de tuto. 32. Substanco de la dentegoj de elefanto. (R). 34. Persona posedaj pronomo. 37. Disbranĉiĝanta fadenforma funiklo konektanta la cerbon kaj mjelon kun la diversaj partoj de la korpo. 39. Persona nedifinita pronomo. 41. Ino. senkolora kaj senodora substanco uzata por fabriki kandelojn. 42. Adverbo ĉefe tempa. 44. Kulturata kampo. 45. Kruro. 48. Viviga gaso. 52. Konjunkcio. 53. Praktiki vintran sporton. 54. TM. 55. Ediktoj de la rusa caro. 58. Publika ĝardeno. (R). 59. Laŭta, subita sono de la voĉo (R). 60. Sveda industriisto, kiu malkovris dinomiton (Alfred, 1833—96). 61. Pingloarbo. 62. Turka greno (R). 63. Barilspeco (R). 64. Kontraŭa. 65. Ritme, rime. 66. UON. 67. Donanta aŭ ricevanta fortan vivan lumon. 68. Maldika tabuleto, sur kiu la pentristo miksas la farbojn (R).

Vertikalaj linioj: 2. Malofta elemento, prometio. 3. Oni havas kvin sur la mano (R). 4. Ronda disko, turniĝanta ĉirkaŭ akso. 5. Lirika poemo. 6. SO. 7. Originale tropika arbo kun duoble pintaj folioj (R). 8. Varma ŝirmejo por infano. 9. Tero, polvo miksita kun akvo sur la strato (R). 10. Grava homa sento (R). 11. Grimacas. 12. Vivigan gason. 17. Akva herbo kun forta tigo. 18. Tre konata (R). 20. Agadi ŝerce kaj sendisciplline. (R). 21. Ceremonie respektas Dion. 23. Prepozicio. 26. Apartenanta al iu norda gento (R). 27. Artikolo. 28. Ne rekta (R). 29. Karesnomo de la patrino. 30. Granda lago inter Kanado kaj ŝtato Nov-Jorko (R). 31. Dramo de Ŝekspiro: Reĝo... 33. Eminenta pola esperantisto, tradukisto (Kazimierz, 1872—1959). 35. Nedifina pronomo. 36. Kovraĵo. 38. Profetaĵo (R). 40. Nedifina pronomo. 43. Vortkomenco en sciencaj nomoj, signifanta: grandega. 46. La kvina monato (R). 47. BJ. 49. Reen: en kiu loko? 51. Tre simpla dometo. 53. Tia, ke ĉiuj ĝiaj organoj normale funkcias. 54. Malgaje, malĝoje. 56. Petalaro, tutaĵo de tiuj florfolioj de interna perianto (R). 57. ZED. 58. Orienta manĝaĵo, el rizo kaj viando (R). 59. Delikata tuŝo (R). 61. Perdinta sian naturan ruĝetan koloron, blanketa ekz. vizaĝo. 62. Elpremi lakton el mamo (R). 64. Besteto vivanta en Eŭropo kaj Azio, kies piedoj kaj ungegoj estas plataj fosiloj (R). 65. Superflua, senutila (R). 67. HN. 68. Protaktino.

FERI

La ĝusta solvo de nia enigmo aperinta en HV 76/2 estas: „Esperanto estas la plej bona solvo de la ideo de la internacja lingvo."

Libropremion gajnis: Stanislavo Plachta el Pollando, Else Rasmussen el Danlando kaj Gábor Fogarassy el Hungario.

LINGVAJ LUDOJ

Foliumante la vortaron la longaj vortoj ofte ŝajnas al ni kvazaŭ ili estus kunmetaĵoj de pluraj „elementoj"... Tiu rekono sugestis la ludon: VORTEKVACIO.

Por klarigo jen ekzemplo: persona pronomo + rilata al nia globo + alta konstruaĵo = tuto de la skribita kulturo.

Solvo: li + tera + turo = literaturo

Post tiu ĉi klarigo, jen estas la solvendaj vortekvacioj:

1. Valorpapero (R). + homa mordilo = malfeliĉa okazaĵo, kaŭzanta materiajn aŭ korpajn damaĝojn.

2. Numeralo + malfacile paŝi pro kripleco de kruro aŭ piedo = parkere reciti kun artisme taŭga tono.

3. Rilata al subtera kavaĵo, el kiu oni elfosas ekspluateblajn substancojn + speco de fiŝkaptilo = svelta turo de moskeo.

4. Fortega nenormala konstanta inklino al io (R) + publikaj aŭ privataj ceremonioj kaj plezuroj por soleni iun okazaĵon = solena skriba deklaro.

5. Malutila ronĝulo (R.) + tio, kio la kapon ligas al la trunko = organo moviganta la organismojn.

6. Apliko de objekto al ĝia destino, por kontrolo, ĉu ĝi taŭgas + muzikaĵo por voĉo = homo inciitanta al batalo.

7. Supernatura estaĵo (R.) + esprima movo permana = asimilpretigo de la nutraĵoj en la nutrokanalo.

8. Io, kion devas koni neniu alia aŭ nur limigita

nombro da personoj (R.) + kantmelodio = konfidenculo oficeja.

9. Metala elemento (R.) + tero kaj polvo miksita kun akvo = speco de katuno, krudkolora aŭ blanka.

10. Vidosensa halucino (R.) + konsistiga elemento de tutaĵo = movebla vizaĝoŝirmilo de kasko.

Sendu al ni la dek solvojn. Ĉiu kunludanto rajtas sendi al ni similajn vortekvaciojn. La ensendantojn de ĝustaj solvoj, kaj trafaj novfaritaj vortekvacioj ni premios kaj la plej sukcesajn ni publikigos.

Ĝojige multaj kunludantoj sin anoncis post nia alvoko, kaj nun ni kun ĝojo plenumas nian promeson publikigi la lingvajn ludojn faritajn de niaj legantoj-kunludantoj.

Pro nesufiĉa spaco ni povas citi nur kelkajn. Jen *intarzio* de *Viktoro Arolovič* el *Moskvo*.

„Por mia amiko el StockHOLM EStis delonga revo vojaĝi tra Sovetio. Liaj gepatroj GRUMblis kaj konsideris tion kiel aŭdaCAN UTOpion. Tamen la amiko persistis kaj defendis rezonon noBLAN, KE pli gravas havi indan interesiĝon en la kaPO OL dolarojn aŭ FRANKojn en la poŝo. Liaj PRIVATaj financoj vere ne sufiĉis por la vojaĝo, sed LIN Savis premio en literatura konkurso; dank' al ĜI VOJElspeza problemo estis solvita. Do la revo de mia amiko realiĝis, kaj moskvaj esperantiSTOJ ANtaŭnelonge bonvenigis lin en sia klubo.

s-ano Arolovič faris ankaŭ sukcesajn anagramojn, kaj proponis publikigi nur la miksliteran formon, por ke la originan oni divenu:

Ekzemple: Kiu estas la konata Bulgara esperantisto, kies nomo estas kaŝita en „Lia seka vinkelo"?

Solvo: Nikola Aleksiev. — Dankon, gratulon!

Atanas Gaev el Bulgario sendis serion de anagramoj, faritaj el la nomliteroj de Imre Kutas, ĉefsekretario de HEA.

Jen parto de lia serio: Kuras time, kiu tremas, mi kuretas, triku same, estu krima, iam streku, mute sakri, miksu rate, krias mute, mirus kate, amu kriste, mire taksu, tria mekus ...

— Jen, kiel riĉa estas nia lingvo, kaj ludema la homa fantazio!

MIHÁLY GERGELY:

MOTO

(al mia nova novelaro)

Vi ne povas travagadi tutan teron,
vi ne povas gustumi ĉiun vinon,
vi ne povas brakumi ĉiun virinon,
vi ne povas kanti ĉiun kanton —

tamen:

travagadu la mondon, ĝis vi maljuniĝos,
gustumu vinojn, dolĉajn kaj maldolĉajn
trinkaĵojn,
amu, ĝis bruligos vian koron pasioj,
kantu pri viaj tristoj kaj ĝojoj ravajn
melodiojn —

ĉar se vi ne tiel vivis: kial vi vivis?!

(Samarkando—Ŝofio—Berlino—Budapeŝto)

ŜAKO

"Gens una sumus" – Unu gento ni estas

Rubrikestro: d-ro Jozefo Németh

Al nia ekiranta rubriko ni aplikos moton de FIDE *(Federation Internationale Des Echecs): „Gens una sumus"!* Ni deziras, ke ankaŭ tiu ĉi rubriko helpu per siaj modestaj rimedoj la interligon de la ŝakludantoj per Esperanto. Ni esperas, ke la multhoma familio de la esperantistoj kaj ŝakludantoj trovos multe da ĝojo en la ŝakproblemoj, kaj komunikaĵoj de nia rubriko.

1-a numero

D-ro György Páros

Rapidtema-turniro en Kalocsa, 1975.

I-a premio



Mato en 2 movoj. — Blanko komencas.

Blanko: Rg2, Tc8, Te7, Kd6, Ke2, Ĉb5, Ĉg7, c2, f3, (9)
Nigro: Rd5, Da1, Ta2, Kd1, Kh6, Ĉb2, Ĉg5, b6, f6, h7, (10)
Limdato de la solvo: 30—09—1976.

Ĉiujare ni donos premiojn en tri okazoj po 2. Bonvolu skribi sur la koverton: Ŝako. Ni atendas la solvojn de niaj karaj ŝak-amikoj, krome proponojn, sentencojn, kiujn ni povos utiligi en la redaktado.

Ŝak-leksikoneto (1)

Lando / Figuro	Reĝo	Damo	Turo	Kuriero	Ĉevalo	Peono
Esperantio	R	D	T	K	Ĉ	P
Britio	K	Q	R	B	S	P
Ĉeĥoslovakio	K	D	V	S	J	P
Francio	R	D	T	F	C	P
Germanio, Jugoslavio, Svedio	K	D	T	L	S	B
Hispanio, Italio	R	D	T	A	C	P
Hungario	K	V	B	F	H	G

KALENDARO

1941—08—04 Antaŭ 35 jaroj mortis Mihály *Babits*, elstara hungara verkisto, poeto. Vidu HV 64/3.

1866—08—07 Antaŭ 110 jaroj naskiĝis Johannes *Dietterle*, germana esperantisto, redaktoro de „Originala Verkaro de Zamenhof".

1866—08—12 Antaŭ 110 jaroj naskiĝis Jacinto Benavente, hispana Nobel-premiita dramverkisto.

1901—08—20 Antaŭ 75 jaroj naskiĝis Salvatore *Quasimodo*, itala Nobel-premiita poeto, arttradukisto, kritikisto.

1891—08—23 Antaŭ 85 jaroj naskiĝis Pál *Tolnai*, hungara meritplena esperantisto. Vidu HV 61/3—4.

1851—08—26 Antaŭ 125 jaroj naskiĝis Emile *Boirac*, franca filozofo, esperantisto, vortaristo, tradukisto.

1936—08—31 Antaŭ 40 jaroj mortis Katarina *Hámán*, hungara esperantisto, elstara batalanto de hungara laborista movado.

1916—09—14 Antaŭ 70 jaroj mortis José *Echegaray*, hispana Nobel-premiita dramverkisto, politikisto.

1926—09—16 Antaŭ 50 jaroj naskiĝis István *Simon*, hungara poeto, arttradukisto. Vidu HV 69/3.

1891—09—21 Antaŭ 85 jaroj naskiĝis Karl *Minor*, germana esperantisto, tradukisto, vortaristo.

1891—09—24 Antaŭ 85 jaroj naskiĝis Hendrik *Adamson*, estona esperantisto, poeto, verkisto.

1901—09—28 Antaŭ 75 jaroj naskiĝis Tiberio *Morariu*, rumana esperantisto, verkisto, tradukisto.

Komp. L. *Rieth*

Korespondi deziras

El Ĉeĥoslovakio: S-ro Jozefo Trombitás, 04964 *Sirk*, okr. Roznava pri numismatiko kaj interŝanĝo de moneroj.

El hungario: F-ino Maria Alapi 3060 *Pásztó*, Kossuth u. 100 kaj F-ino Maria Nagy, 3060, *Pásztó*, Muzsla u. 1. Ambaŭ estas 16-jaraj kaj korespondus pri poŝtmark-kolektado kaj moderna muziko. F-ino Teréz Dittrich 7754 *Bóly*, Damjanich u. 10. 21-jara pri kolekto de sapoj.

El Italio: F-ino Monica Simeoni, Via Primaticcio 98, 20100 *Milano* 12-jara. F-ino Niodini Pattrizia, Via Sardegna 31, 20100 *Milano* 16-jara. S-ro Lusiardi Daniele, Viale Ungheria, 5, 20100 *Milano* 16-jara. F-ino Fabiano Manuela, Via Trieste 32, 20010 s. *Stefano T.* 32-jara. S-rino Merry Fornaretto, Via Carlo Marx 36, 20153 *Milano* 33-jara kaj Maria Gioia Fornaretto 12-jara filino.

El Jugoslavio: 39-jara ĵurnalisto kaj 36-jara juristo serĉas kontakton kun du hungaraj esperantistinoj pri reciproka vizitado. Slavko Šimunić, poŝtfako 4039, YU-41110 *Zagreb*.

El Pollando: F-ino Danuta Śniegon, ul. Jaworskiej 15, 43-200 *Pszczyna* 14-jara komencanto pri kolekto de bildkartoj kaj poŝtmarkoj. F-ino Anna Grosicka, ul. Piastów 3/12, 86-050 *Solec Kuj.* 17-jara pri sporto, moderna muziko, turismo. S-ro Tadeusz Brzezniak, ul. Machnice-18, 55-114 *Wisznia Mala* woj. Wroclaw 18-jara lernanto pri literaturo, teatro, kino, moderna muziko, sporto, turismo kaj reciproka gastigado. S-ro Grzegorz Koziara, ul. Narcyzów 7. 42-600 *Tarnowiskie Góry* 20-jara pri turismo.

El Rumanio: S-ro Jenő Zágoni, Poŝtkesto 10. R-4000 *SF. Gheorge* ekslibrisojn interŝanĝas kaj kolektas por ekspozicio el ĉiuj landoj, rekompencas laŭdezire (prefere per poŝtmarkoj).

El Sovetunio: S-ro Jaroslav Matvijisyn (35-jara) do vostrebovania; 252001 *Kiev-1* kaj interŝanĝi librojn, poŝtmarkojn kaj bildkartojn pri arto.

Humuro

Vica, ĉarma knabineto, tamen havas la miskutimon fari pri ĉiu rimarkon. La patrino multfoje ŝin admonas:

— Filinjo, tio ne decas. Se vi vidas ion, notu tion en via kapo, kaj hejme ni priparolos la aferon.

Lastokaze ili veturis sur tramo kaj vidalvide aĉ ili sidis aĝulino kun ekstremlonga nazo. La patrino tuj flaris danĝeron kaj klopodis deflankigi la atenton de la etulino: — Vidu, Vicinjo, kiel kuras la arboj.

La infano tamen nur plu gapas la nazon de virino kaj fine diras laŭ te:

— Panjo, la nazon de ĉi tiu onjo ni pripaloros hejme, ĉu ne?

* * *

Talmudisto cerbumas super siaj libroj. Lia kunulo lin demandas, pri kio li meditas.

— Mi cerbumas pri tio, ĉu nia Dio povas esti ĉiopova.

— Granda Dio en la ĉieloj! — teruriĝas la demandinto. — Kiel do oni rajtas cerbumi pri tio?

— Nu, tiam respondu: ĉu Dio povas krei tian rokon, kiun li ne povas movi de ĝia loko?

E HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
1368 Budapest, Hungario,
VIII. Kenyérmező u. 6.
Aperas dumonate
XV. jaro. 1976. 4-a numero

Ĉefredaktoro: *Mihály Gergely*
Responda redaktoro:
d-ro István Nagy
Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoraro:
Szilárd Bálint, Vilmos Benczik, Ada Csíszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, d-ro Lajos Lesznai, László Rieth, Mária Rózsa Szabó, Tibor Ujlaki-Nagy, Zsuzsa Varga-Haszonits

Ĉefkunlaborantoj:
Paŭlo Balkányi, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechan, Aurél Ponori Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi, Lajos Tárkony

Redakcio: Budapest VIII., Kenyérmező utca 6.
Telefono: 141-078, 137-872

Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepeno, Budapest VII., Rákóczi út 54.

Responda eldonisto: Márton Gábor direktoro

Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215—96162 1900 Budapest V., József nádor tér 1.) senpere, aŭ per poŝtmandato.

La abono estas por jaro (ses numeroj) Ft. 48.—, al eksterlando krome Ft 9.60 por afranko.

Peranto al eksterlando: KULTURA, H—1389 Budapest P.O.B. 149
Abonprezo por unu jaro (ses numeroj): 7,— Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto

2677 76-5 Somogy m. Ny. 3000
Responda gvidanto:
Béla Farkas direktoro
Indexszám: 25 377

LEHEL S-150 ❀❀❀

ABSORBA MASTRUMA FRIDUJO

Produktas: HŰTŐGÉPGYÁR (Fridilfabriko)



Konsumturist

Valoraj artobjektoj
porcelano de bona marko
stilmebloj



Varojn aĉetitajn
en subaj vendejoj oni povas
sendogane elporti el la lando

Vi povas aĉeti el granda sortimento kontraŭ valuto internacie ŝangebla

en niaj vendejoj en Budapeŝto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27., kaj 43.
Hotel Intercontinental — Hotel Gellért